
# EL POPOLA ĈINIO

11
1977

中国报道






Varma aklamo pro la venka okaziĝo de la 11-a kongreso de la Partio

# La Dekunua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio

La kongreso solene okazis en meza tagdeko de aŭgusto, 1977, en pekino.



amarado Hua
uofeng, prezi-
nto de la
entra Komitato
 la Komunista
artio de Ĉinio





Prezidanto Hua Guofeng kaj Vicprezidantoj Je Gianjing, Deng Hiaŭping, Li Hiannian kaj Vang Donghing sur la podio


中国共产党第十一次




La kongresejo





Prezidanto Hua kaj aliaj membroj de la Politika Buroo de CK de KPĈ intervidiĝas kun la reprezentantoj.



La reprezentantoj diskutas dokumentojn de la kongreso.

La reprezentantoj varme aplaŭdas sukcesan fermiĝon de la kongreso.



EL POPOLA ĈINIO
中国报道

1977
N-ro 11
(230)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

KOVRILO:

Paĝo 1: Ĝoja celebrado
Paĝo 4: Leona danco



## Enhavo

La Dekunua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio . . . 2

Vizito de Prezidanto Tito al Ĉinio . . . 9

Petrolminejo novtipa . . . 14

Bona situacio de la fervoja trafiko . . . 17

Amikeca invita konkurso de futbalo . . . 21

La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en antaŭenmarŝado . . . 24

MATERIALO: La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio . . . 31

Vojaĝo sur stepo . . . 32

HISTORIAJ OBJEKTOJ: Grava arkeologia eltrovo en la Interna Mongolio . . . 36

Kreskado de du junaj matematikistoj . . . 39

"Nudpieda" kuracisto de jaŭ-a nacieco . . . 41

La "kvarpersona bando" estas ekstreme dekstra alo . . . 45

POR AMIKECO: En la sama lekciejo . . . 48

KURANTAJ AFEROJ . . . 50

# La Dekunua Tutlanda
# Komunista Partio

*La reprezentantoj eniras la kongresejon.*



# Kongreso de la de Ĉinio



LA Dekunua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio solene okazis en Pekino de la 12-a ĝis la 18-a de aŭgusto, 1977.

La kongreso estis kunvokita antaŭ la regula tempo, post la forpaso de la granda gvidanto kaj instruisto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ Zedong kaj post la granda venko de nia partio en la frakaso de la kontraŭpartia "kvarpersona bando" de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan.

Prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio Hua Guofeng prezidis la kongreson.

La kongreson ĉeestis sume 1,510 reprezentantoj, kiuj reprezentis pli ol 35 milionojn da membroj de la tuta partio. Inter la reprezentantoj estis eminentaj partianoj maljunaj, mezaĝaj kaj junaj, provitaj en diversaj periodoj de la fondo de la Partio ĝis la Granda Proleta Kultura Revolucio. Granda parto de ili estis labormodeloj, avangardaj laborantoj, batalaj herooj kaj modeloj en lernado de Daking en industrio kaj en lernado de Daĝaj en agrikulturo. Ankaŭ la partianoj devenintaj de Tajvan-provinco elektis siajn reprezentantojn al la kongreso.

La tagordo de la kongreso havis tri programerojn: 1) la politika raporto de la Centra Komitato; 2) la revizio de la Statuto de la Komu-

nista Partio de Ĉinio kaj la raporto pri la revizio de la partia statuto; 3) la elekto de la Centra Komitato.

Post la inaŭguro de la kongreso Prezidanto Hua Guofeng faris politikan raporton al la kongreso en la nomo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Unue li proponis, ke ĉiuj kamaradoj stariĝu por silente memori pri Prezidanto Maŭ Zedong, fondinto de la Komunista Partio de Ĉinio, la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj la Ĉina Popola Respubliko kaj granda gvidanto kaj instruisto de la proletaro kaj diversnaciecaj popoloj de Ĉinio, pri la estimataj kaj amataj Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj Prezidanto Ĝu De, grandaj proletaj revoluciistoj de la ĉina popolo kaj longe provitaj intimaj kunbatalantoj de Prezidanto Maŭ, forpasintaj en la pasinta jaro, pri Kamaradoj Kang Ŝeng, Dong Bivu, Li Fuĉun, Ĉen Ji kaj He Long, proletaj revoluciistoj farintaj eminentajn kontribuojn al la revolucia afero de la ĉina popolo, forpasintaj post la Deka Tutlanda Kongreso de la Partio kaj en kelkaj jaroj antaŭ ĝi, kaj pri ĉiuj membroj de la Centra Komitato kaj aliaj kamaradoj farintaj gravajn kontribuojn por la Partio kaj revolucio, forpasintaj en tiu tempo.

En sia raporto Prezidanto Hua montris, ke ĉi tiu kongreso estas ŝarĝita per grava historia tasko, nome, alte teni la grandan standardon de Prezidanto Maŭ, daŭrigi la aferon postlasitan de li, resumi la batalon kontraŭ la "kvarpersona bando" de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ, persisti en la fundamenta linio de la Partio, persisti en daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, mobilizi ĉiujn aktivajn faktorojn en kaj ekster la Partio kaj la lando, unuigi ĉiujn unuigeblajn fortojn kaj klopodi por efektivigi la strategian decidon teni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron por ordigi la landon kaj konstrui Ĉinion en grandan modernan socialisman potencon en la kuranta jarcento.

En sia politika raporto daŭrinta 4 horojn Prezidanto Hua resumis la dekunuan batalon inter la du linioj de la Komunista Partio de

*Laboristoj en varma celebrado*






*Komandantoj kaj soldatoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo celebras la sukceson de la kongreso.*

*Kamparanoj en ĝoja celebra manifestacio*




Ĉinio, precize eksplikis la grandan teorion de Prezidanto Maŭ pri daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro, profunde analizis la nuntempan situacion internacian kaj enlandan kaj pliapaŝe eksplikis la batalajn taskojn de nia partio en la nuna tempo kaj en la estonta certa periodo por efektivigi la strategian decidon teni klasbatalon kiel la ĉefĉeneron por ordigi la landon.

Prezidanto Hua proklamis, ke la frakaso de la "kvarpersona bando" markis triumfan finiĝon de la unua Granda Proleta Kultura Revolucio de nia lando daŭrinta 11 jarojn. Nun ni povas realigi stabilecon kaj unuiĝon laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ kaj efektivigi plenan ordon de la lando. Li montris, ke la triumfa finiĝo de la unua Granda Proleta Kultura Revolucio absolute ne signifas finiĝon de klasbatalo. Li alvokis ĉiujn kamaradojn nepre sekvi la instruojn de Prezidanto Maŭ kaj daŭrigi la revolucion sub la diktaturo de la proletaro ĝis la fino.

Prezidanto Hua montris, ke post la triumfa finiĝo de la Granda Proleta Kultura Revolucio la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando eniris en novan stadion de disvolvo. La nuna situacio estas bonega. Sub la puŝado de la granda klasbatalo de malkaŝo kaj kritiko al la "kvarpersona bando" aperas nova antaŭensalto de la nacia ekonomio. Progresas la revolucio de scienca kaj teknika fronto, la eduka revolucio, la literatura kaj arta revolucio kaj la higiena revolucio.

Prezidanto Hua proklamis ke la Centra Komitato decidis kunvoki en konvena tempo la Kvinan Tutlandan Popolan Kongreson kaj samtempe la sesion de la Kvina Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa konferenco. Estas necese fari seriozajn klopodojn por mobilizi ĉiujn aktivajn faktorojn en kaj ekster la Partio, plifirmigi grandan unuiĝon de la tuta partio, la tuta armeo kaj la popolo de ĉiuj naciecoj de la tuta lando kaj kune batali por firmigi la diktaturon de la proletaro kaj konstrui la grandan socialisman patrolandon.

En sia politika raporto Prezidanto Hua refoje deklaris, ke la Komunista Partio de Ĉinio



kaj la ĉina popolo persistos en la proleta internaciismo kaj daŭre observos la revolucian diplomatian linion de Prezidanto Maŭ. Analizante la internacian situacion li montris, ke samtempe kun la daŭra kresko de la faktoroj de revolucio, evidente kreskas la faktoroj de milito. Sovetunio kaj Usono estas fonto de nova monda milito, kaj precipe la sovetunia socialimperiismo estas pli danĝera. La popoloj de ĉiuj landoj devas altigi singardemon, strikte unuiĝi kaj fari senlacan bataladon. Li diris, ke la teorio pri divido de la tri mondoj elmetita de Prezidanto Maŭ montris ĝeneralan direkton de la nuna internacia batalo kaj klare difinis,



*La Unua Sesio de la Dekunua Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio*

kiuj estas ĉefaj fortoj de revolucio, kiuj estas ĉefaj malamikoj kaj kiuj estas mezaj fortoj unuigeblaj, kaj dank' al tio la internacia proletaro povas unuigi ĉiujn unuigeblajn fortojn kaj formi plej vastan unuecan fronton por oponi kontraŭ la ĉefaj malamikoj en la mondsfera klasbatalo. Tio estas ĝusta strategia kaj taktika difino por la internacia proletaro en la nuna tempo kaj klasa linio de la proletaro en la internacia batalo.

En sia raporto Prezidanto Hua pliapaŝe eksplikis la ok ĉefajn batalajn taskojn de teno de klasbatalo kiel la ĉefĉenero por ordigi la landon: Nepre konduki la grandan batalon de malkaŝo kaj kritiko al la "kvarpersona bando" ĝis la fino; nepre bone fari ordigon de la Partio kaj ĝustigon de laborstilo kaj plifortigi la partian konstruadon; nepre bone ordigi kaj konstrui diversnivelajn gvidantarojn de la Partio; nepre teni la revolucion, stimuli la produkton kaj antaŭenpuŝi la nacian ekonomion; nepre bone fari la revolucion en sfero de kulturo kaj eduko kaj plenenergie disvolvi socialisman kulturan kaj edukan aferon; plifortigi la popolajn ŝtatajn maŝinojn; disvolvi demokration kaj perfektigi demokratian centralizismon;

plenumi politikon de unueca planado, multflanka konsiderado kaj plenampleksa aranĝado kaj mobilizi ĉiujn aktivajn fortojn por konstrui socialismon. Li montris, ke la batalo de malkaŝo kaj kritiko al la "kvarpersona bando" restas ankoraŭ centro de la batalo inter la du klasoj kaj inter la du vojoj, kaj teni tiun batalon signifas teni la ĉefĉeneron.

La raporto de Prezidanto Hua vekis varman aplaŭdon de tempo al tempo.

Posttagmeze de la 13-a de aŭgusto Vicprezidanto Je Gianjing faris raporton pri revizio de la partia statuto en la nomo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. En sia raporto li montris, ke la projekto de la reviziita partia statuto alte tenas la grandan standardon de Prezidanto Maŭ, plene enkorpigis lian doktrinon de partia konstruado, kaj teorion kaj linion de daŭrigo de la revolucio sub la diktaturo de la proletaro kaj manifestis la sukceson akiritan en la granda batalo de la frakaso de la "kvarpersona bando". Li diris, ke la nova partia statuto aprobota de tiu kongreso estos grava armilo por plifortigi ideologian kaj organizan konstruadon de nia partio. La diversnivelaj partiaj organizoj kaj ĉiuj partianoj devas serioze studi, rigore observi kaj rezolute plenumi la partian statuton kaj batali kontraŭ ĉiuj paroloj kaj agoj ĝin malobservantaj.

La reprezentantoj serioze kaj varme diskutis la raportojn de Prezidanto Hua kaj Vicprezidanto Je kaj la projekton de la reviziita partia statuto. Ĉiuj sentis senĝenecon kaj plene eldiris siajn opiniojn. La kongreso iris en atmosfero de viveco kaj disvolvis bonajn tradiciojn kaj bonan laborstilon de nia partio.

Posttagmeze de la 18-a de aŭgusto la kongreso okazigis sian trian plenan sesion. Surbaze de plena interkonsiliĝo kaj diskutado la reprezentantoj elektis la Dekunuan Centran Komitaton de la Komunista Partio de Ĉinio per sekreta baloto. La kongreso unuanime aprobis la rezolucion pri la politika raporto kaj unuanime aprobis la novan Statuton de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la raporton pri revizio de la partia statuto. Kiam la plenuma prezidanto de la kongreso Kamarado Deng Hiaŭping proklamis, ke Kamarado Hua Guofeng estis elektita kiel membro de la Centra Komitato, eksplodis longa kaj ŝtorma aplaŭdo en la kunvenejo. Estis elektitaj sume 201 membroj kaj 132 kandidataj membroj de la Centra Komitato.

Vicprezidanto Deng Hiaŭping faris ferman paroladon en la kongreso. Li montris, ke la kongreso estos registrita en la gloran historion de nia partio, kiel tia kongreso, kiu ĉiuflanke kaj ĝuste plenumis la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, restarigis kaj disvolvis la bonajn tradiciojn kaj bonan laborstilon de nia partio kaj puŝis la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de nia lando al nova periodo de disvolvo.

Vicprezidanto Deng Hiaŭping diris, ke post la frakaso de la "kvarpersona bando" tute noviĝis la fizionomio de la tuta partio kaj la tuta lando kaj ni jam akiris grandajn venkojn. Sed ankoraŭ estas multaj problemoj, kiujn ni devas solvi, kaj nemalmultaj malfaciloj, kiujn ni devas venki. Ni profunde kredas, ke se nur ni vere kredas al kaj nin apogas sur la amasoj, ni certe povas venki ĉiujn malfacilojn kaj akiri novajn venkojn unu post alia.

Vicprezidanto Deng Hiaŭping alvokis la tutan partion pli strikte unuiĝi ĉirkaŭ la Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng kaj diligente klopodi por konstrui nian landon en grandan modernan socialisman potencon.

La Dekunua Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio sukcese fermiĝis en la majesta kantado de "La Internacio".

En la 19-a de aŭgusto la Dekunua Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kunvokis sian Unuan Plenan Sesion kaj elektis la centran organon. Hua Guofeng estis elektita kiel prezidanto de la Centra Komitato kaj Je Gianjing, Deng Hiaŭping, Li Hiannian kaj Vang Donghing estis elektitaj kiel ĝiaj vicprezidantoj.

# Varma celebrado de la 11-a Tutlanda Kongreso de la Partio

Gaja tamtamado kaj tamburado





Celebrado en nokto





Sur Tian-anmen-placo

Dancado






Tibetanoj en dancado




ĈPLA-trupoj en demonstracio

Infanoj en demonstracio



Aklamas Tajvan-provincanoj en Pekino.




Aklamo de la popolo



Ĝojo de ĉiuj nacioj





Popola ŝipa danco



Draka danco

# Vizito de Prezidanto Tito al Ĉinio

LAŬ invito de la ĉina registaro, Josip Broz Tito, prezidanto de la Socialisma Federacia Respubliko de Jugoslavio, faris oficialan amikan viziton al nia lando de la 30-a de aŭgusto ĝis la 8-a de septembro.

La vizito de Prezidanto Tito al nia lando estas grava evento en la interrilato inter Ĉinio kaj Jugoslavio. Kun ĝojo la ĉina popolo varme kaj solene bonvenigis lin.

Antaŭtagmeze de la 30-a de aŭgusto, kiam Prezidanto Tito alvenis al Pekino per speciala aviadilo, Hua Guofeng, prezidanto de CK de KPĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, Deng Hiaŭping kaj Li Hiannian, vicprezidantoj



*Prezidanto Tito atingis Pekinon.*



*Akompanate de Prezidanto Hua Guofeng, Prezidanto Tito veturas tra Tian-anmen-placo.*

de CK de KPĈ kaj vicĉefministroj de la Ŝtata Konsilantaro kaj Vu De, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso, varme bonvenigis Prezidanton Tito kaj aliajn honorindajn gastojn el Jugoslavio sur la aerodromo.

Dum la vizitado, la gvidantoj de Ĉinio kaj Jugoslavio faris plurfojajn ampleksajn interparolojn pri demandoj interesaj al ambaŭ flankoj. La interparoloj iris en etoso de sincereco kaj amikeco.


La diversnacieca popolo de Jugoslavio estas diligenta kaj brava popolo, kiu timas nenian perforton kaj havas gloran tradicion de revolucia batalado. Prezidanto Tito estas unu el la famaj kontraŭfaŝismaj gvidantoj. Ankoraŭ freŝa estas la memoro pri la senmortaj faroj de Prezidanto Tito en gvidado de la jugoslava popolo en brava rezistado kontraŭ la germanaj kaj italaj faŝistaj invadantoj. Hodiaŭ kiam kreskadas la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Jugoslavio en kuna batalado kontraŭ hegemoniismo, la vizito de Prezidanto Tito al nia lando pliapaŝe akcelis la batalan amikecon inter niaj popoloj.

La 31-an de aŭgusto, akompanate de Vang Donghing, vicprezidanto de CK de KPĈ, Prezidanto Tito vizitis la Memoran Halon de Prezidanto Maŭ kaj montris respekton al la korpo de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Tito faris silentan staron memore al Prezidanto Maŭ, antaŭ lia sidanta marmora statuo, kaj prezentis florkronon, kies silka rubando portis la surskribajon "Al Prezidanto Maŭ Zedong". Ankaŭ la sekvantaro de Prezidanto Tito montris respekton al la korpo de Prezidanto Maŭ.

Posttagmeze de la 30-a de aŭgusto, Deng Jingĉaŭ, vicprezidantino de la Konstanta Komitato de la Popola Kongreso vizitis Prezidanton Tito kaj kore salutis lin. Ambaŭ ili havis amikan interparolon.

Prezidanto Tito faris plezuran ekskurson al Badaling, akompanate de Gi Pengfej, ĝenerala sekretario de la Konstanta Komitato de la Popola Kongreso kaj Ju Ĝan, viceministro de eksteraj aferoj. La 85-jara Prezidanto Tito ascendis sur





*Prezidanto Tito staris silente antaŭ la statuo de Prezidanto Maŭ kaj prezentis florkronon.*

la turon de alarma fajro-signalo por milito, ĝuis fruaŭtunan pejzaĝon de la Granda Muro serpentanta en la verda montaro, laŭdis la saĝon kaj kreivon de la ĉina laboranta popolo en antikveco, interesoplene fotis ĉinajn akompanantojn kaj donacis al ili la fotojn kun lia subskribo.

Je la 3-a de septembro, Prezidanto Tito finis sian viziton al Pekino kaj veturis al Hangĝoŭ, Ŝanhajo kaj Urumĉi por vizito akompanate de



*Akompanate de Vicprezidanto Je Gianjing, Prezidanto Tito ĉeestas sportan kunvenon.*


Li Hiannian, vicprezidanto de CK de KPĈ kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro. Kien Prezidanto Tito iris, tie li estis varme kaj solene bonvenigata de la lokaj registaroj kaj popolanoj. La 8-an de septembro, Prezidanto Tito finis sian vizitadon al nia lando kaj veturis de Urumĉi al sia lando. Sur la aerodromo li diris al Vicprezidanto Li Hiannian kaj Vicprezidanto Sajfudin, kiuj venis por lin adiaŭi, ke ili vivis tre plezure kaj kontente en Ĉinio, ĉio iris tre bone kaj ili spertis amikan intervidiĝon.

Forlasante Ĉinion, Prezidanto Tito sendis telegramon al Prezidanto Hua Guofeng, en kiu li diris: "Mi estas konvinkita, ke nia ĉifoja intervido kaj la detalaj kaj fruktodonaj interparoloj faritaj de ni en atmosfero de reciproka respekto kaj interkompreno estas grava kontribuo al la amikeco inter la Socialisma Federacia Respubliko de Jugoslavio kaj la Ĉina Popola Respubliko, al plia disvolviĝo de la kunlaboro inter la du landoj, kaj al pli multa kompreno kaj kunlaboro sur la tero."



*Gvidantoj de Ĉinio kaj Jugoslavio en interparolado*

*Ekskurso al la Granda Muro*




*Vizito al la Malmolosta Sesa Kompanio de la Ĉina Popola Liberiga Armeo*






*Prezidanto Tito forlasas Urumĉi por reveni al sia lando.*

*Vizito de Vicprezidantino Deng Jing-ĉaŭ al Prezidanto Tito en la gastejo*







DAKING (5)

VANG ĈUAN:

# Petrolminejo novtipa

VETURANTE per aŭtobuso sur la vasta Daking-olekampo ni vidas ambaŭflanke de la ŝoseo ebenajn kampojn kaj vicojn kaj vicojn da brikaj unuetaĝaj domoj borderitaj per poploj. Familianoj de laboristoj kaj oficistoj plugas aŭ semadas surkampe kaj gregoj da bovoj kaj ŝafoj paŝtiĝas sur herbejoj. Ĉe ŝaktoskafaldoj intense laboras putoboristoj. Ĉio ĉi tio formis belan bildon kiu nin impresis profunde.

Daking estas novtipa socialisma minejo kun petrolkemia industrio kiel la kerno, karakterizita per la kombino de industrio, agrikulturo, komerco, eduko kaj milita afero kaj plenampleksa disvolvo de agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, fiŝbredado kaj flankokupoj. Ĝi ne transformiĝis en grandan urbon, sed konstruiĝis sur ĝi 60 "centraj vilaĝoj de laboristoj kaj kamparanoj" kaj 164 loĝpunktoj ĉirkaŭ ili. La pavimitaj ŝoseoj kunligas tiujn vilaĝojn kun la fabrikoj kaj gvidaj institucioj de la olekampo. Ĉe la centraj vilaĝoj kaj loĝpunktoj estas instalaĵoj por produktado, edukado, sanprotektado kaj diversaj servoj, kaj oni ne bezonas iri malproksimen por labori, lerni, ricevi kuracadon kaj partopreni en agrikultura produktado. Ili estas ame nomataj "vilaĝoj urbotipaj kaj urboj vilaĝotipaj".

Sed en 1960 kiam komenciĝis ekspluato de Daking-olekampo, iuj proponis konstrui petrolan urbegon ĉ. 50 kilometrojn fore de la olekampo, kie koncentre lokiĝos la administrejo de la olekampo, lernejoj, hospitaloj, teatroj, vendejoj, servaj instalaĵoj kaj loĝkvartaloj. La laboristoj opiniis, ke tia aranĝo estas oportuna nek al produktado nek al la vivo. Ĉar tia urbo, sufiĉe ampleksa kaj moderna, estus dense loĝata, bruoplena, polucia kaj malproksima de la laboraj lokoj de la laboristoj kaj de la kamparo kiu provizos la loĝantojn per greno, legomoj, fruktoj, viandoj kaj aliaj manĝaĵoj. Kaj krome la laboristaj familianoj el kamparo fariĝus konsumantoj pro la transloĝiĝo al urbo. Tial oni decidis rompi tian tradician faron observante la instrukcion faritan de Prezidanto Maŭ Zedong dum sia inspektado al iu fera-ŝtala kompanio "**Krom industrio oni ankaŭ devas iom sin okupi pri agrikulturo, komerco, eduko kaj milita afero**", ellaboris projekton pri konstruo de la olekampo kaj alvokis ke laboristoj, oficistoj kaj iliaj familianoj ekspluatu virgan teron kaj fondu dislokitajn loĝpunktojn en la minejo. En 1963, dum sia inspektado en Daking Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj resumis tiun sperton kaj elmetis la principon de konstruo de minejo en "kombino de laboristoj kun kamparanoj, kombino de urbo kun kamparo kaj favoreco al produktado kaj oportuneco al la vivo". Dum dekkelk jaroj la konstruado de Daking iris ĝuste laŭ tiu principo.

Pionira Vilaĝo estas laborista-kamparana vilaĝo plej frue starigita en la olekampo. Printempe de 1962, responde al la alvoko de la partia komitato de la olekampo, Hjue Gujfang kaj aliaj kvar laboristaj edzinoj partoprenis la unuaj en kolektiva produkta laboro. Ili venis kun fosiloj, pakaĵoj kaj infanoj por kulturi virgan teron. Tiam sur la stepo sin trovis herboj ĝistalie altaj kaj lupoj hurladis en nokto. Ili dormis nokte en


tendo kaj kuraĝigis unu alian, ke ili nepre persistos en kultivado, kiel ajn grandajn malfacilojn ili renkontos. Kuraĝigite de ilia ekzemplo multaj aliaj laboristaj edzinoj poste partoprenis en tio. Ne havante bovojn ili mem tiris plugilon. Post malfacila laborado ili ekspluatis du hektarojn da tero, kiu donis grenon kaj legomojn tiujare. La heroaĵo de Hjue Gujfang kaj aliaj rapide disvastiĝis tra la olekampo kaj estis laŭdata kiel "revoluciado kun kvin fosiloj".

Forpasis dekkelk jaroj kaj multe ŝanĝiĝis la fizionomio de la Pionira Vilaĝo. Nun tiu centra vilaĝo havas 2,500 loĝantojn de 660 familioj sub la gvido de la administra stacio de laboristaj familianoj. La stacio ankaŭ gvidas agrikulturan kaj flankokupan produktadon, administras komercon, kulturon kaj edukon, higienan laboron kaj aliajn servajn aferojn kaj zorgas pri la politika kaj ideologia edukado al la familianoj de la ĉirkaŭaj loĝpunktoj. En la vilaĝo troviĝas kompare granda magazeno, lernejo kun elementaj kaj mezaj klasoj, kuracejo kun 30 litoj kaj 40 kuracistoj kaj flegistoj, 5 infanĝardenoj kaj vartejoj, kiuj akceptas infanojn en aĝo de unu monato ĝis 6 jaroj. La loĝantoj loĝas en larĝaj domoj en kiuj instaliĝas akvokondukilo, elektro, radiatora kaj gasproviza sistemoj.

La pli ol 200 hektaroj da agro de la vilaĝo estas kulturataj per traktoroj kaj kombajnoj anstataŭ fosiloj kaj falĉiloj, kaj surkampe instaliĝis ekipaĵoj por asperga irigaciado de pli ol 100 hektaroj da tero. La familianoj kulturas ne nur grenojn, sed ankaŭ diversajn fruktarbojn kaj bredas porkojn, aliajn dombrutojn kaj fiŝojn. Tie konstruiĝis ankaŭ forcejo kun areo de 1.3 hektaroj por kreskigi legomojn ankaŭ en vintro kun frosto de 40° C sub la nulo.

La pli ol 40,000 laborkapablaj familianoj de Daking-aj laboristoj partoprenis en produktado de agrikulturo kaj flankokupoj. Dum dekkelk jaroj ili ekspluatis pli ol 21,000 hektarojn da virga tero. En 1976 sole, ili jam produktis pli ol 30,000 tunojn da greno, 72,500 tunojn da legomoj, bredis 110,000 porkojn per kolektiva forto, kaj rikoltis 85,000 kilogramojn da diversaj fruktoj. Ili kreis por la ŝtato grandan kvanton da riĉaĵoj, kaj samtempe plibonigis la vivon de la laboristoj kaj familianoj.

Kvankam pliboniĝis la vivkondiĉo, tamen oni ankoraŭ emfazas la spiriton de penema batalo por konstrui pli bone la laboristan-kamparanan vilaĝon. Dank' al partopreno en kolektiva produktado de agrikulturo kaj flankokupoj, sinkleri-



*Parto de Daking-olekampo*

gado, studo de politiko kaj milita afero, kaj partopreno en klasbatalo, la familianoj de laboristoj kaj oficistoj sin revoluciigas en ideologio kaj profunde ŝanĝiĝis ĉiuflanke.

La edzinoj de laboristoj kaj oficistoj ne plu estas dependantoj. Ili kontribuas al la socialisma konstruado kaj estas egalrajtaj en politiko same kiel la viroj. Ili estas mastroj de la ŝtato kaj la entrepreno, diversaj laboroj de la vilaĝoj estas plenumataj de ili kaj ili mem aranĝas siajn kolektivan studon de politiko, produktadon kaj vivon.

Eble venas al iuj la demando kiel oni pagas la laboron de la familianoj de Daking. Same kiel membroj de popola komunumo de la kamparo ili ricevas laboran rekompencon laŭ la principo de la socialisma kolektiva posedsistemo t.e. esti rekompencitaj laŭ la kvanto de ricevitaj laborpoentoj. En Daking troviĝas neniu familio kun luksajoj, kaj neniu maltrankviliĝas pro manko de manĝo kaj vesto kaj senlaboreco. Laŭ statistiko de 1976, la pli ol 600 familioj deponis pli ol 400,000 juanojn en banko.

Plej admirinda estas tio ke iom post iom malaperas ĉe ili la koncepto de privata posedanteco kaj kreskas ilia amo al la ŝtato kaj kolektivo. Ekzemple laborista edzino Ju Hajĝen laboris nur por mono en la komenca periodo post kiam ŝi partoprenis en laboro de la laborista-kamparana vilaĝo kaj oni moke nomis ŝin "poentomaniulino". Poste en kolektivaj lernado, laborado kaj vivo ŝi iom post iom akiris komprenon pri revolucio, liberigis sin el egoismo kaj ekamis la kolektivon. Iufoje antaŭ neĝado, ŝi rimarkis ke ne estas sufiĉaj matoj por kovri maizon sur draŝejo. Ŝi kuris hejmen kaj elportis siajn du kotonajn litkovrilojn kaj unu novan lanan litkovrilon por ĝin kovri. Iu demandis ŝin: "Kion fari, se via nova litkovrilo difektiĝos?" Ju Hajĝen diris: "Se ne estus socialismo, nenie mi povus ricevi laborpoentojn por ne paroli pri akiro de lana litkovrilo!"

En Daking aperis nova rilato inter la geedzoj kaj malaperis la pasintaj fenomenoj de servado de edzino al edzo kaj bato de viro al virino. La geedzoj kune laboras, interhelpas en lernado kaj kune mastrumas sian domon kaj kuraĝigas unu la alian por progresi. Multaj geedzoj estis elektitaj kiel laboraj modeloj de la olekampo.

En la pasintaj dekkelk jaroj, el la familianoj de Daking-aj laboristoj kaj oficistoj, 11,060 estis elektitaj kiel avangardaj produktantoj kaj laborantoj, 3,246 glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio, 1,368 estas promociitaj kiel diversnivelaj gvidantoj de la olekampo, kaj iuj eĉ fariĝis gvidantoj de la ministerioj de petrola kaj karba industrioj.

La proleta revolucia instruisto Engels iam diris, ke malaperigo de la kontraŭstaro inter la urbo kaj la kamparo ne nur estas ebla, sed jam fariĝis rekta postulo de la industria produktado mem. Hodiaŭ, la Daking-anoj agas ĝuste laŭ la antaŭdiro de Engels kaj klopodas por kiel eble plej frue efektivigi la idealon.



*Membroj de la Virina Olekolekta Taĉmento en politika studo*



*Komunisto Hia Juĉuan, lokomotivisto de la Hjuĝoŭ-a Fervoja Buroo, diligente plenuminta sian laboron sen foresto dum 14 jaroj*

# Bona situacio de la fervoja trafiko

de **PENG GIAŬ**

ANTAŬ oktobro de la pasinta jaro, la fervoja transportado iam estis malforta ĉenero, kiu malhelpis disvolviĝon de aliaj branĉoj de nia nacia ekonomio. Sed, post kiam CK de KPĈ estrata de Prezidanto Hua Guofeng frakasis la "kvarpersonan bandon" de Vang-Ĝang-Giang-Jaŭ kaj forigis iliajn ĝenadon kaj detruadon al la fervoja trafiko, la situacio rapide boniĝis. En la kuranta jaro la trajnoj kuras sekure kaj akurate.

Ekde marto la ŝarĝ- kaj malŝarĝ-kvanto de varvagonoj de la tutlanda fervojo rekte altiĝis, kaj oni ĉiumonate superplenumis la planon de la ŝtato. En aprilo oni kreis la plej altan rekordon de nia lando en meznombra taga ŝarĝkvanto de vagonoj. Ĝis la fino de junio, la fervoja transportado de la varkvanto de la tuta lando jam plenumis 50.9% de la plano. En la kuranta duonjaro, la taga ŝarĝ- kaj malŝarĝ-kvanto de varoj daŭre leviĝas.

Tie ĉi, ni iom retrorigardu la malbonojn faritajn de la "kvarpersona bando" al la fervoja trafiko. Ĝi povas helpi la legantojn pli bone koni la hodiaŭan situacion de nia fervojo.

En la jaro 1976, la "kvarpersona bando" rapidigis sian paŝon por uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Unu el iliaj taktikoj estis fabriki malordon, detrui la nacian ekonomion kaj imputi la krimon al grandnombraj revoluciaj gvidantoj de la Centra Komitato de la Partio kaj la lokoj, por uzurpi la potencon en ĥaoso. La fervojo, aorto de la nacia ekonomio, fariĝis grava branĉo, kiun ili klopodis por regi kaj detrui.

En la socialisma Ĉinio, la fervojo estas la tutpopola posedaĵo, kaj ĝia laboro devas esti unuece direktata sub la absoluta gvido de la Partio. Sed, la "kvarpersona bando" metis siajn konfidatojn sur gvidajn postenojn de iuj fervojaj departementoj por starigi sian propran sistemon kaj tiel forpuŝi la gvidon de la partia komitato. Ili batis kaj persekutis la gvidajn kadrojn, kiuj persistis en la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj kalumniis la laboristojn pene laborantajn por socialismo per la akuzo "scii nur akuratan veturon" kaj "malatenti la politikon". Ili likvidis raciajn regularojn kaj sistemojn kaj malordigis la planon de la fervoja trafiko.

La Fervoja Administra Buroo de Ĝenggoŭ estas la trafika akso de centra Ĉinio. Sub regado de la "kvarpersona bando" kaj iliaj adeptoj, ĝia taga ŝarĝkvanto de vagonoj grandnombre reduktiĝis, kaj ĝi ne povis plenumi la transportan planon ĉiumonate. Kaj krome ilia detruado kaŭzis gravan obstrukcon al la du ĉefaj fervojaj


linioj Pekino-Kantono kaj Lianjungang-Lanĝoŭ. Kaj ankaŭ iuj aliaj fervojaj buroo j suferis en malsamaj gradoj ĝenadon kaj detruadon de la "kvarpersona bando". Vidinte la staton, la kadroj kaj amasoj maltrankviliĝis pri tio kaj tre malamis ilin.


La popolo tre ĝojis de la venko super la "kvarpersona bando". En decembro de la pasinta jaro, CK de KPĈ komencis solvi la problemon de la fervoja buroo de Ĝenggoŭ. En februaro de la kuranta jaro, la Ŝtata Konsilantaro kunvokis la Tutlandan Kunvenon de la Fervoja Laboro. La revolucia aktiveco de la fervojistoj sufokita de la "kvarpersona bando" tuj erupciis. Ili firme respondis la alvokon de Prezidanto Hua "tenu klasbatalon kiel ĉefĉeneron por ordigi la landon" kaj decidis pli rapide bonigi la fervojan trafikon. La partiaj komitatoj de ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj donis grandan zorgon al tio kaj mobilizis ĉiujn profesiojn kaj branĉojn por forte subteni la fervojan laboron kaj helpi ĝin en urĝaj ŝarĝado kaj malŝarĝado, tiel ke la longe amasiĝintaj varoj disportiĝis al la lokoj ilin bezonantaj.

En kelkaj monatoj granda ŝanĝo jam okazis al la Fervoja Buroo de Ĝenggoŭ. Ĝi ne nur forigis obstrukcon, sed ankaŭ ĉiumonate superplenumis la transportan planon ekde februaro, per kio finiĝis la situacio de 19-monata neplenumo de la ŝtata transporta plano. En la tempo, kiam freneze aktivadis la "kvarpersona bando", la Stacio Luojang sub la buroo de Ĝenggoŭ preskaŭ ne faris transportadon de pakaĵoj, tial la pakaĵoj monte amasiĝis sur kajo kaj en staplejoj, kaj la pridemandaj telegramoj el ĉiuj lokoj amasiĝis en kolumno 1 metron alta. Post frakaso de la "kvarpersona bando", kadroj kaj laboristoj de la tuta stacio kune laboris kaj en mallonga tempo forveturigis ĉiujn prokrastitajn pakaĵojn. Nun, la laboro tute estas en ordo, kaj neniu pakaĵo estas prokrastita.

Jangkjuan de Ŝanhi-provinco estas unu el la ĉefaj produktejoj de antracito en nia lando. En la pasinteco, pro malbona funkciado de la fervojo, multe da karbo estis monte amasigita kaj ne povis esti forportita. En februaro, la Ŝtata Konsilantaro ordonis, ke la fervoja branĉo nepre plenumu transportadon de la tuta stagna karbo

*La Kantona Suda Stacio transsendas konstruajn instrumentojn kaj materialojn al kamparo.*






de ĉiuj karbominejoj antaŭ la fino de aŭgusto. La Fervoja Administra Buroo de Pekino kaj la Karbomina Administra Buroo de Jangkjuan tutforte kunlaboris kaj komencis urĝan transportadon ekde marto. En ordinaraj tagoj, la stacio de Jangkjuan jam sentis nesufiĉon de ekipaĵoj por akcepti pasaĝer- kaj var-vagonarojn. Krome iu linio nepre pasata de vagonaroj estis riparata ĉiutage tri horojn. Tio multe malfaciligis la urĝan transportadon. Tamen, kun granda decidemo kaj plena energio, la laborantoj volis ĉiamaniere gajni tion, kion perdigis al ni la "kvarpersona bando". Ĝis la fino de majo ili transportis la karbon stagniĝintan en Jangkjuan. Ankaŭ la aliaj fervojaj burooj antaŭdate plenumis la karbotransportan taskon donitan de la ŝtato.


En marto, du fervojaj burooj de Ĝenĝoŭ kaj Pekino iniciatis socialisman konkurson. Nun, la konkurso vaste disvolviĝis inter la fervojaj departementoj de la tuta lando. Ĉiu fervoja buroo faris sian planon pri lerno de Daking kaj decidis en 3-5 jaroj reformi sian fervojan departementon en Daking-tipan. En la konkurso montriĝis alta entuziasmo de la fervojistoj, pliboniĝis ilia ĉeestantara procento kaj disciplino, tiel ke la ekonomia kaj teknika normoj kontinue leviĝis. Depost la konkurso la Fervoja Administra Buroo de Kantono ĉiutage superplenumis la planon de ŝarĝado kaj malŝarĝado de varoj, kaj 95% de pasaĝeraj kaj 90% de varaj vagonaroj povas akurate veturi.

En la socialisma konkurso, la laborantoj de persontrafiko lernas la revolucian spiriton de

*Produktaĵo de la Ĉangling-a Petrola Rafinejo de Hunan-provinco estas transportata aliloken.*



*Vagonaro de la Hining-a Fervoja Buroo estas ŝarĝata per karbo.*





*Honora ruĝa flago al avangarda vagono*



*La manovra stacio de Hjuĝoŭ en streĉa laboro*

Lej Feng, disvolvas la bonan tradicion tutkore servi al la popolo kaj klopodas por plibonigi sian servon. En vagonoj ĉie regas pureco kaj ordeco. La konduktoroj afable akceptas pasaĝerojn kaj donas apartan helpon kaj zorgemon al la maljunuloj, malsanuloj, malfortuloj, kripluloj kaj infanportantajn pasaĝerojn. Ili ofte diskutas pri plibonigo de servo. Ekzemple, en longa vojaĝo se iu pasaĝero perdis unu aŭ du butonojn, li sentas maloportunecon, kvankam tio estas bagatela. Iuj pasaĝeroj ne kutimiĝas al longa vojaĝo kaj facile suferas de veturmalsano. Por tio multaj vagonaroj pligrandigis sian servospacon. En la vagonaro la servopunkto preparas por pasaĝeroj kudrilojn, fadenon, butonojn, paperojn, kovertojn, poŝtmarkojn, dentobrosojn, dentopaston, cigaredojn ktp; kaj la kuracpunkto liveras sian servon per la ofte uzataj medikamentoj. Iuj el la konduktoroj estas trejnitaj kiel "nudpiedaj" kuracistoj, kiuj senpage donas kuracon al malsanaj pasaĝeroj. La manĝovagono liveras abundajn manĝajojn. Nova fizionomio aperis en ĉiuj stacioj. Post la diskutado, "pro kio ni devas bone fari la servon?" la laborantoj de la Ŝigiaĝuang-a Stacio pli bone komprenis la signifon de sia laboro kaj entuziasme servas al la pasaĝeroj. La laborantoj de la Ŝanhaja Stacio starigis iujn specialajn servojn al la pasaĝeroj, kiuj havas malfacilojn. Ekzemple, ili povas eskorti pasaĝerojn al iliaj hejmoj, se estas necese, anstataŭe lui por ili taksion kaj sendi telegramon, telefonon k.a. Tiuj faroj ricevas laŭdon de la pasaĝeroj.

La fervoja trafiko estas "pioniro" de la nacia ekonomio. Ĝi rapide normaliĝis en la funkciado kaj komencas impeton en sia laboro. Tio kreas necesajn kondiĉojn por la plenampleksa antaŭensaltego de la nacia ekonomio de Ĉinio.



*La irana kaj gvinea teamoj en matĉo*

# Amikeca invita konkurso de futbalo

de **BIAN GIĜI**

ESTIS vespero de la 30-a de julio. En la Pekina Laborista Stadiono de tempo al tempo aŭdiĝis tondra aplaŭdo. La fremdlandaj amikoj partoprenintaj en la Pekina Internacia Amikeca Invita Konkurso de Futbalo en 1977, ĉinaj sportistoj kaj spektatoroj ĝoje kolektiĝis por celebri sukcesan finiĝon de la konkurso. Kiam la organiza komitato donacis "amikecajn pokalojn" unu post alia al ĉiu futbala teamo, eksonis longtempa aplaŭdado en la stadiono.

La invita konkurso estis komencita en la 17-a de julio. La altira, intensa kaj emocia konkurso montris al spektatoroj ke ĝi estas grandioza kunveno por fortigi la amikecon, interŝanĝi futbalan arton, lerni unu de alia kaj kune altiĝi en ludarto.

En tiu ĉi invita konkurso partoprenis 12 teamoj el 8 landoj kaj unu regiono: la Taedong-rivera teamo de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, la etiopia teamo, la gvinea dua teamo, la hongkong-a teamo, la irana teamo, la japana teamo, la teamo de la aŭtonoma universitato de Meksikio, la maroka teamo, la zaira teamo kaj tri teamoj de Ĉinio.

"Ni metis amikecon super gajnon kaj perdon en konkurso." Tio estas komuna volo de la diverslandaj amikoj partoprenintaj en la konkurso. Kubanangidi, ĉefo de la Zaira Futbala Delegacio diris: "Antaŭ nelonge Zairo estis en batalo kontraŭ agresa armeo. Por akceli amikecon kun la popoloj kaj sportistoj de diversaj landoj, ni organizis nian futbalan teamon. Ni venas por amikeco."

En intensa konkurso senĉese aperis solidaraj kaj amikaj kondutoj. Iufoje, en matĉo inter hongkong-a kaj irana teamoj, Ĝang Giaping, 8-a teamano de Hongkong rapide kuras kun pilko al rivala golejo. Ĝuste kiam li volis forte piedbati la pilkon, la golulo de la irana teamo elpafiĝis el la golejo por bari la pilkon. En tiu mo-

mento, se Ĝang Giaping farus atakon, la golulo vundiĝus, sed li senhezite forlasis la ŝancon por atako kaj plenforte transsaltis la golulon. Lian bonan konduton preferi perdi pilkon ol vundi rivalan teamanon la spektatoroj aprobis per varma mankrakado. Amikaj scenoj ofte aperis dum matĉoj: Iu sportisto glitfalis, sportistoj de la rivalo tuj forlasis la pilkon kaj kuris al li por helpi. Kaj ĉiam en tia kazo eksplodis mankrakado kaj huraado en la stadiono. E. Pezeshkpour, ĉefo de la Irana Futbala Delegacio diris: "Ni esperas gajni ĉampionecon de amikeco kaj bonkonduto." Li eldiris kion ĉiuj aliaj volas diri.

*Entuziasmaj spektantoj*




"Amikeco" fariĝis centro en interparolado de la sportistoj. Ni neniam forgesos, ke por partopreni en la amikeca invita konkurso la amikoj venkis multajn malfacilojn. Por efektivigi la celon de la konkurso la amikoj tage kaj nokte diligente ekzercis, helpis unu la alian kaj pro tio la invita konkurso glate iris kaj akiris plenan sukceson.

Dum la lastaj jaroj, ĉinaj futbalaj sportistoj vizitis pli ol 50 landojn kaj regionojn kaj entuziasme akceptis futbalajn teamojn de pli ol 40 landoj kaj regionoj vizitintajn nian landon. La futbalistoj partoprenintaj en tiu ĉi pekina invita konkurso ne nur refoje montris al ni lertan futbalan arton, sed ankaŭ esprimis amikan senton al la ĉina popolo. La invita konkurso estis bona ŝanco de lerno por ĉinaj spektatoroj kaj sportistoj.

La futbalaj teamoj partoprenintaj en la invita konkurso havas siajn proprajn stilojn. Multe da junaj futbalistoj montriĝis viglecplenaj kaj


*La Taedong-rivera Teamo de Koreio kaj ĉina teamo*



altiris al si apartan atenton de la publiko. Ekzemple, la dua teamo de Gvineo havas 18 teamanojn, el kiuj 15 estas studentoj. La japana teamo estis antaŭ nelonge organizita el junaj elstaraj sportistoj elektitaj en la tuta lando kaj havas tre grandan latenton. La membroj de la ĉina junula teamo venas de 11 provincoj, municipoj kaj ilia meznombra aĝo estas nur 21 jaroj. Kvankam al ili mankas sperto por granda internacia konkurso, tamen ili rigardis rivalon kiel sian instruiston, timas nek fortan teamon nek malvenkon. Pro tio ili fine atingis novan nivelon, montris bonan stilon kaj gajnis ĉampionon de la invita konkurso gajninte kvar venkojn kaj unu egalecon en kvin matĉoj. La hongkong-a teamo kaj taedong-rivera teamo de Koreio gajnis la duan lokon kaj la trian lokon.

Kvankam la Pekina Internacia Amika Invita Konkurso de Futbalo de 1977 jam venke finiĝis, tamen la amikeco starigita en tiu ĉi invita konkurso ĉiam instigos la futbalistojn en senĉesa marŝo.





*La Ĉina Dua Teamo kaj la Taedong-rivera Teamo de Koreio interŝanĝas la teamajn flagojn antaŭ matĉo*



*Ekskurso sur rivero post konkurso*

*Sportistoj sur la Granda Muro*



# La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en Antaŭenmarŝado

*Karaj legantoj, rigardante la mapon de la Ĉina Popola Respubliko, vi povas rimarki la Aŭtonoman Regionon de Interna Mongolio en la norda parto de Ĉinio, kiu intertuŝiĝas kun la Mongola Popola Respubliko. Ĝi estas la plej frua nacimalplimulta aŭtonoma regiono de Ĉinio, kiu fondiĝis antaŭ 30 jaroj.*

*Kiaj ŝanĝiĝoj okazis al ĝi kaj kial ĝi povis atingi tiajn sukcesojn en la pasintaj 30 jaroj? Okaze de celebrado de la 30-a datreveno de la fondiĝo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio ĵurnalistoj de nia revuo intervjuis respondeculojn de la aŭtonoma regiono. Ĉi sube ni aperigu la ĉefan enhavon de la intervjuo.*

— La Red.

La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio




Prezentado de migranta ensemblo al paŝtistoj



## KIAL LA AŬTONOMA REGIONO DE INTERNA MONGOLIO FONDIĜIS ANTAŬ LA NASKIĜO DE LA POPOLA RESPUBLIKO?

En somero de la kuranta jaro la diversnaciecaj popolanoj de la Interna Mongolio ĝoje celebris sian grandiozan feston — la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la aŭtonoma regiono. Tuj poste ili faris, kune kun aliaj popolanoj de la tuta lando, aktivan preparadon por bonvenigi la 28-an datrevenon de sia patrolando — la Ĉina Popola Respubliko.

Kial ĝi, kiel unu el la aŭtonomaj regionoj de la Ĉina Popola Respubliko, povis fondiĝi antaŭ la naskiĝo de la respubliko? Ĉar antaŭ la fondiĝo de la respubliko jam estis pretigitaj kondiĉoj por tio. La afero mem elokvente montris la zorgon de la Komunista Partio de Ĉinio pri la nacimalplimultoj.

De sia fondiĝo la Komunista Partio de Ĉinio rezolute oponis kontraŭ la politiko kaj sistemo de imperiismo kaj kuomintanga reakciularo pri nacia subpremado kaj pledis por la politiko de egaleco, unuiĝo kaj interhelpo de ĉiuj naciecoj. Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito Prezidanto Maŭ ellaboris politikon pri aŭtonomeco de nacieca regiono, kaj pli poste klaraj difinoj pri tio estis skribitaj en la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko.

Kiaj kondiĉoj necesas por efektivigi aŭtonomecon en la regionoj koncentre loĝataj de nacimalplimultoj? Unu el la plej gravaj kondiĉoj estas tio ke ili havas grandan nombron da nacimalplimultaj kadroj, por ke ili povu plenumi rajtojn kiel mastroj.

La Komunista Partio de Ĉinio ĉiam atentas kulturadon de nacimalplimultaj kadroj. Frue en 1924 la Partio jam kulturis kaj varbis la unuan nombron da mongolaj partianoj en la

*Diversnaciaj popolanoj de la Interna Mongolio celebras la 30-an datrevenon de la fondiĝo de la aŭtonoma regiono.*



Pekina Mongola kaj Tibetana Lernejo kaj fondis la unuan partian filion de mongoloj. En 1926 Prezidanto Maŭ kulturis nombron da junaj mongolaj partianoj en la Kantona Instituto de la Kamparana Movado. Tiuj mongolaj partianoj disvolvis poste partiajn organizojn en la Interna Mongolio kaj gvidis la popolanojn de la mongola, hana kaj aliaj naciecoj en disvolvo de la revolucia movado. Precipe en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito la Centra Komitato de la Partio kulturis grandan nombron da mongolaj kadroj en la Jan-an-a Nacimalplimulta Instituto; samtempe ĝi sendis trupojn de la Okavoja Armeo al lokoj de la Interna Mongolio okupitaj de la japanaj agresantoj por fondi la Daking-montan Bazlokon. En la longa kontraŭjapana gerila milito hardiĝis multaj mongolaj kadroj. Post la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito plejparto de la Interna Mongolio estis liberigita. Tiam la Centra Komitato de la Partio sendis nombron da mongolaj kaj hanaj kadroj al tiu regiono por disvolvi movadon de nacieca aŭtonomeco. Kune kun lokaj partiaj organizoj ili gvidis la amasojn en frakaso de la intrigo de la usona imperiismo kaj la reakciularo de Ĉiang Kaj-ŝek pri detruo de nacia unuiĝo kaj nacia aŭtonomeco, fondis la Federacion de Aŭtonoma Movado de Interna Mongolio por vaste disvolvi tiun movadon.


En printempo de 1947, kvankam la Liberiga Milito ankoraŭ venke iris tra la tuta lando, tamen la Federacio de Aŭtonoma Movado de Interna Mongolio gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio ne nur starigis popolajn armitajn fortojn, fiaskigis atakon de la kuomintanga reakcia armeo kaj firmigis kaj disvastigis la liberigitajn regionojn, sed ankaŭ reformis la malnovan reĝimon, fondis bazajn filiojn kaj disvolvis grandskalan batalon por redukti terrenton kaj interezon kaj kontraŭ tiranoj, kaj pro tio ĝi estis varme subtenata ĝenerale de ĉiuj naciecoj en la Interna Mongolio. Tiam fundamente maturiĝis la kondiĉoj por efektivigi aŭtonomecon de nacieca regiono. La Federacio de Aŭtonoma Movado okazigis la Popolan Kongreson de Interna Mongolio kaj proklamis la fondiĝon de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Okaze de tio Prezidanto Maŭ kaj Ĉefkomandanto Ĝu De speciale sendis telegramon por esprimi gratulon, kio montris koran zorgon de la Centra Komitato de la Partio al la diversnacieca popolo de la Interna Mongolio.

## KIO ESTAS AŬTONOMECO DE NACIECA REGIONO?

Laŭ la difinoj de la Partio kaj la ŝtato, efektivigi aŭtonomecon de nacieca regiono signifas efektivigi aŭtonomecon en lokoj koncentre loĝataj de nacimalplimultoj kaj fondi aŭtonoman organon por ke nacimalplimultoj mem mastru siajn aferojn. En nia lando la lokoj kie efektiviĝis aŭtonomeco de nacieca regiono estas neapartigeblaj partoj de la Ĉina Popola Respubliko kaj la aŭtonomaj organoj estas lokaj registaroj sub la unueca gvido de la Centra Popola Registaro kaj parto de la diktaturo de la proletaro. Same kiel la Guanghi-a Ĝuangnacieca Aŭtonoma Regiono, la Tibeta Aŭtonoma Regiono, la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj la Ninghia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono, la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio estis fondita laŭ tiuj principoj.

Efektivigi aŭtonomecon de nacieca regiono estas fundamenta principo de la Komunista

*Desinfekta banado*




Partio de Ĉinio por solvi la problemon de naciecoj. Ĝi garantiis egalrajtecon al la diversnacieca popolo de la aŭtonomaj regionoj, mobilizis ilian aktivecon por la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, akcelis la disvolviĝon de la nacieca ekonomio, plifortigis la naciecan unuiĝon, plifirmigis la unuecon de la patrolando kaj plifortigis la diktaturon de la proletaro, kaj pro tio ĝi estis varme kaj rezolute subtenata de la diversnaciecaj popolanoj.

## KIEL LA AŬTONOMA REGIONO DE INTERNA MONGOLIO PLENUMAS SIAN AŬTONOMECON?


La fondiĝo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio markis la komenciĝon de nova epoko de la diversnacieca popolo en la politika vivo. Sub la gvido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ŝtata Konsilantaro, laŭ rajtoj difinitaj de la ŝtata leĝo, la aŭtonoma regiono ellaboris leĝojn kaj konkretajn politikojn konformajn al la nacieca regiono de la Interna Mongolio, ekzemple "La Administran Programon de la Popola Registaro de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio", leĝon pri organizo de aŭtonomaj organoj, regularon pri impostokolektado, regularon pri administrado de paŝtejoj, politikon pri malpermeso al ekspluato de virga tero kaj pri protekto de paŝtejoj, kiuj ne nur garantiis la politikajn rajtojn al la popolanoj de la mongola, hana kaj aliaj naciecoj, sed ankaŭ akcelis la disvolviĝon de la nacieca ekonomio kaj kulturo.

Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri fondo de kursoj kaj lernejoj por nacimalplimultaj kadroj, la partia komitato de la aŭtonoma regiono, lige kun ĉefaj laboroj de diversaj periodoj, fondis la Militan kaj Politikan Instituton de Interna Mongolio, la Instituton de Aŭtonomeco de Interna Mongolio kaj diversnivelajn partiajn lernejojn kaj kadrajn lernejojn por ke nacimalplimultaj kadroj kaj bonaj junuloj tie studu Marksismon-Leninismon-Maŭzedongpenson kaj la politikon de la Partio pri naciecoj kaj altigu sian politikan kaj ideologian nivelon kaj laborkapablon. La diversnivelaj partiaj organizoj kulturis grandan nombron da novaj elstaraj nacimalplimultaj kadroj en klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado. Sekretario de la partia komitato de la aŭtonoma regiono Baŭjiledaj estas unu el la bonaj kadroj en la movado de lerno de Daĝaj en bruto-


*La Brutobreda Instituto de Hilingol kulturas veterinarojn por la paŝta regiono.*







*Nova Kemisterka Fabriko de Vulaŝan kun enlande faritaj ekipaĵoj*



*La fervoja stacio de Erenhot*

bredado. Nun multe kreskis la procentoj de nacimaplimultaj kadroj en la totala nombro de la kadroj de la aŭtonoma regiono, kaj pli ol 44% de la ĉefaj gvidantoj de la gubernioj de tiu regiono estas nacimalplimultaj kadroj.

Same kiel aliaj popolanoj de la tuta lando, la popolanoj de la mongola kaj aliaj naciecoj de la aŭtonoma regiono havas la rajtojn esti elektantaj kaj elektitaj. Ili elektis siajn plej konfidindajn reprezentantojn por partopreni en diversnivelaj popolaj kongresoj kaj diversnivelaj partiaj kongresoj de la aŭtonoma regiono kaj la tuta lando. Ili kune kun la reprezentantoj de la tuta lando diskutis grandajn aferojn de la Partio kaj la ŝtato kaj elektis partiajn kaj ŝtatajn gvidantojn. Iuj el la mongolaj reprezentantoj estis elektitaj kiel membroj de CK de KPĈ kaj membro de la Politika Buroo de CK de KPĈ, membroj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj ĝia vicprezidanto.

## KIAJN HELPOJN LA ŜTATO DONIS AL LA AŬTONOMA REGIONO EN EKONOMIO KAJ KULTURO?

En la pasintaj 30 jaroj la ŝtato donis al la aŭtonoma regiono grandan helpon en homfortoj, materialoj, mono, tekniko kaj ekipaĵoj. Ni prenu la industrian konstruadon kiel ekzemplon. En la pasinteco la Interna Mongolio produktis neniom da fero kaj tre postiĝinta estis ĝia industrio. Post la Liberiĝo, helpate de la ŝtato ĝi disvolvis sian aktivecon kaj fondis industriojn de fero, ŝtalo, karbo, elektro, kemio, elektroniko, raraj teroj, konstruado, maŝinfabrikado k.a. Ĝi starigis ankaŭ malpezajn industriojn de plastaĵoj, vitro, papero, sukero, emajlaĵoj, specialaj produktaĵoj por mongoloj kaj metiartaĵoj. La produktovaloro de ĝia industrio, konsistigis 64% de ĝia totala produktovaloro de industrio, agrikulturo kaj brutobredado.

Ankaŭ en financo la ŝtato estas aparte favora al la aŭtonoma regiono. Ekzemple, la ŝtato asignis al ĝi monon por eventualaj bezonoj kaj subvencion por la nacieca regiono por disvolvo de kulturo, eduko, kuracado kaj aliaj aferoj. La

ŝtato ĉiam aplikas politikon de malpeza imposto al brutobredado de la Interna Mongolio, kaj la meznombra tarifo ne superis 1%. La ŝtato praktikas politikon de subvenciado al komerco de la aŭtonoma regiono, ekzemple, la mongoloj ŝatas tebrikojn el suda parto de nia lando. En la pasintaj pli ol 20 jaroj duobliĝis la prezo je kiu la ŝtato ĝin aĉetis en ĝiaj produktejoj, tamen la ŝtato ne ŝanĝis la prezon je kiu ĝi vendas tebrikojn al la paŝtistoj de la Interna Mongolio. Sole por tio la ŝtato ĉiujare devas doni al la aŭtonoma regiono subvencion de pli ol 3,800,000 juanoj. La aparta helpo de la ŝtato en tiu flanko ludas grandan rolon en disvolvo de la ekonomio, kulturo kaj eduko kaj altigo de la popola vivo de la aŭtonoma regiono.

## DISVOLVIĜO DE LA BRUTOBREDADO DE LA INTERNA MONGOLIO POST LA LIBERIĜO

En la pasinteco la brutobredado de la Interna Mongolio apartenis al la postiĝinta ekonomio de feŭdaj brutoposedantoj. Post la fondiĝo de la aŭtonoma regiono oni unue faris demokratian reformon en la paŝtaj regionoj, abolis feŭdajn privilegiojn kaj praktikis politikojn de "komunigo de paŝtejoj kaj libera paŝtado" kaj "helpo al malriĉaj paŝtistoj". Rilate al la grandaj brutoposedantoj, escepte de la ekstreme reakciaj, oni aplikis la politikon "ne batali kontraŭ ili, nek disdoni iliajn brutojn, nek difini por ili klason" kaj "utili kaj al la paŝtistoj kaj al la brutoposedantoj". Kaj poste en la socialisma reforma movado oni aplikis politikon de paca transformo kaj elaĉeto koncerne al la brutoposedantoj. Dank' al tio oni ne nur sukcese unuigis, edukis kaj reformis la brutoposedantojn, sed ankaŭ mobilizis la aktivecon de la vasta amaso de paŝtistoj, ebligis al la paŝtaj regionoj rapide suriri la kolektivigan vojon de kooperativoj kaj popolaj komunumoj kaj multe akcelis la disvolviĝon de la brutobredado.

Parolante pri Ordes-altebenajo, la ĉefa paŝtejo en la suda parto de la Interna Mongolio oni priskribis ĝian mizeran fizionomion de serioza dezertigo de herbejoj kaj redukto de la nombro de brutoj per la vortoj "Ĉie etendiĝas blankaj montetoj de sablo kaj por ĉiu familio estas nur kelkaj nigraj kaproj". Nun ĉio ŝanĝiĝis. Sinapogante sur kolektivaj fortoj de popolaj komunumoj la vasta amaso de paŝtistoj transformis vastajn sablejojn en bazojn de furaĝo kaj greno por nutri brutojn. La nombro de brutoj kvarobliĝis kompare kun tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo kaj la pliboniĝitaj fajnlanaj ŝafoj nombriĝas per centmiloj.

Uŝinĝu-komunumo sur Ordes-altebenajo estas ruĝa flago de lerno de Daĝaj en la paŝta regiono. En la movado de lerno de Daĝaj ĝi rompis superstiĉajn kredojn, mobilizis homajn forton kaj saĝon, energie plantis arbojn kaj kulturis herbojn por fiksi sablon. Samtempe ĝi mobilizis la amasojn por ĉirkaŭi herbejojn pecon post peco per ŝtonmuroj kaj pikdratoj, en kiuj ili fosis putojn, konstruis irigaciajn kanalojn kaj plantis arbojn kaj herbojn por fari ilin bazoj de alta kaj stabila produkto de furaĝo. Tiaj gresejoj garantias al Uŝinĝu-komunumo senĉesan disvolvon de brutobredado.

La aŭtonoma regiono plenenergie disvastigis la sperton de Uŝinĝu kaj levis en la tuta regiono

*Tondado de ŝafoj*



altan tajdon de konstruado de tiaj gresejoj. En la pasintaj kelkaj jaroj ili konstruis en la tuta regiono 670,000 hektarojn da tiaj gresejoj, konstruis herbejojn kun areo de 80,000 kvadrataj kilometroj al kiuj mankis akvo en la pasinteco. La nombro de brutoj kreskis de 6 milionoj en la komenca periodo post la Liberiĝo ĝis 23 milionoj, el kiuj pli ol 27% estas brutoj de bonaj kaj plibonigitaj specioj. Kaj oni elkulturis fajnlanajn ŝafojn kiuj ankaŭ multe donas viandon. Rapide kaj stabile disvolviĝas la brutobredado de la regiono.

## KIEL SOLVI LA PROBLEMON DE PRILABORADO DE BRUTAJ PRODUKTAĴOJ?

La disvolviĝo de brutobredado akcelis la progreson de prilabora industrio de brutaj produktaĵoj. Antaŭ la Liberiĝo en la Interna Mongolio troviĝis nur unu lanŝpina fabriko kun 320 spindeloj kaj kelkaj prilaboraj metiejoj de felo kaj lano. Tiam granda parto de la felo kaj lano de la stepo estis aĉetita de mongolaj fikomercistoj je tre malalta prezo, transportita al urboj ĉe marbordo por prilabori aŭ eksporti. Post la Liberiĝo de la tuta lando, la aŭtonoma regiono fondis, laŭ la bezono de brutobredado kaj helpate de la ŝtato, fabrikojn de lana ŝpinado, tapiŝoj, laktaĵoj kaj ostogluaĵo kaj prilaboran industrion de viando, ledo kaj felo. Nun en la regiono estas 119 relative grandaj prilaborejoj de brutaj produktaĵoj kaj ĉiuj gubernioj kaj iuj komunumoj fondis nombron da malgrandaj prilaborejoj, tiel ke la brutaj produktaĵoj povas esti fundamente prilaboritaj ĉeloke. Nun la nombro de spindeloj jam atingis pli ol 26,600 kaj aldoniĝis fabrikado de delikataj lanfadenoj por teksado, lanfadenoj por trikado kaj pluŝo.

## KIEL EPIDEMIOJ ESTAS BRIDITAJ?

En la pasinteco relative multaj epidemioj cirkulis sur la stepo, inter kiuj la plej damaĝa estis venera malsano. Ĝi kaŭzis morton al granda nombro da paŝtistoj, al kiuj mankis mono por kuracado kaj kuracistoj, kaj serioze minacis la ekziston de la mongola nacieco. Ekzemple, en Jiĥgu-ajmago estis pli ol 400,000 loĝantoj en la meza periodo de la deksepa jarcento, tamen pro malsanoj, malsato kaj aliaj kialoj restis nur 80,000 antaŭvespere de la Liberiĝo.

Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio tre zorgis la vivon kaj sanon de la nacimalplimultaj popolanoj. Post la Liberiĝo de la tuta lando, la ŝtato sendis grandan nombron da medicinaj laborantoj al la stepo de la Interna Mongolio por preventi epidemiojn kaj kuraci sifilison kaj disvolvi patriotan sanprotektan movadon. En nur kelkaj jaroj la epidemioj estis briditaj kaj la nombro de la mongoloj kaj aliaj nacimalplimultaj loĝantoj komencis kreski dank' al efika kuracado de malsanoj kaj altigo de la vivnivelo.

La instrukcio de Prezidanto Maŭ "**meti la gravitan punkton de higienaj laboroj en la kamparon**" rapidigis la disvolvon de la sanprotekta afero de la aŭtonoma regiono. Ne nur en la urboj estas hospitaloj, virinaj kaj infanaj sanitarejoj kaj apotekoj, sed ankaŭ en la vasta kamparo kaj paŝtejoj estas kuracejoj de komunumoj kaj stacioj de koopera kuracado kaj nudpiedaj kuracistoj de brigadoj, tiel ke malsanuloj povas ricevi ĝustatempan kuracadon. La nombro de la mongolaj loĝantoj 2.3-obliĝis kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo. La paŝtistoj ofte diras, ke dank' al Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio ili havas la hodiaŭan feliĉan vivon.

La simplaj vortoj de la paŝtistoj montris fundamentan fakton, ke la politiko de Prezidanto Maŭ pri naciecoj estas fundamenta garantio de disvolviĝo de ĉiuj aferoj de la aŭtonoma regiono. Nun post la frakaso de la damninda "kvarpersona bando" la diversnaciecaj popolanoj de la Interna Mongolio decidis, sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio estrata de Prezidanto Hua, daŭrigi la aferon postlasitan de Prezidanto Maŭ, plifortigi la unuiĝon de la naciecoj kaj konstrui la nordan landliman parton de la patrolando en regionon kun modernaj agrikulturo kaj brutobredado, industrio, nacidefendo, sciencoj kaj teknikoj por opono kontraŭ kaj prevento de reviziismo.

# La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio

La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, kutime nomata mallonge la Interna Mongolio, situas ĉe la norda landlimo de Ĉinio. Ĝi najbaras al la Popola Respubliko de Mongolio. Ĝia areo estas pli ol 400,000 kvadrataj kilometroj kaj ĝia loĝantaro el mongoloj, hanoj, hujoj, manĉuroj k.a. nombras pli ol 8 milionojn. La tuta regiono dividiĝas en 4 ajmagojn (t. e. subregionoj) kun 16 gubernioj, 27 hoŝo-oj (egalaj al gubernioj) kaj 3 urboj de la nivelo de gubernio. Ĝia ĉefurbo estas Huhehoto.

La tuta regiono estas parto de la Altebenaĵo de Interna Mongolio kun alteco de pli ol mil metroj super la mara nivelo. Jinŝan-montaro kuŝas oriente-okcidente en ĝia mezo kaj la altebenaĵo norde de tiu montaro kun vasta herbejo estas unu el la bonaj paŝtejoj de Ĉinio. Sude de la montaro kaj norde de Ordes-stepo fluas la Flava Rivero, kie formiĝas Hetaŭ-ebenaĵo, kiu estas la ĉefa agrikultura regiono de la Interna Mongolio. Sude de la Flava Rivero estas Ordes-altebenaĵo kun alteco de 1,000 ĝis 1,300 metroj super la mara nivelo. En la norda parto de la altebenaĵo troviĝas Kuerbuĉi-dezerto kaj en la suda parto Muus-dezerto. La orienta parto de Jinŝan-montaro tuŝanta la orientan parton de Hetaŭ-ebenaĵo enhavas intermontajn basenojn kaj moderajn deklivojn, kiuj estas gravaj areoj por agrikulturo kaj paŝtado.

La klimato de la tuta regiono estas frosta en vintro kaj varmeta en somero, la precipitaĵo estas koncentra kaj la senprujna periodo mallonga.

La ĉefaj brutoj en la Interna Mongolio estas ŝafoj kaj kaproj kaj ankaŭ bovoj, ĉevaloj kaj kameloj. La ĉefaj plantoj estas tritiko, aveno, terpomo, oleolino kaj sukerbeto.

La specoj kaj konservataj kvantoj de mineraloj de la Interna Mongolio estas multaj. Interalie, la karbomino en Daking-monto kaj la ferminejo de Bajan-obo estas tre famaj, kaj krome troviĝas minoj de asbesto, grafito, glimo, natura alkalo, salo k. a. Tio estas bona kondiĉo por disvolvo de industrio de la aŭtonoma regiono.

Kun disvolviĝo de industrio, agrikulturo kaj brutobredado de la aŭtonoma regiono, ankaŭ ĝia trafikado rapide disvolviĝas. Nun jam formiĝis en ĝi trafika reto de fervojoj, ŝoseoj, aviado kaj surakva transportado kun la fervojoj kiel la centro.




### "IKONOGRAFIO DE KURACAJ HERBOJ EL KINGHAJ-TIBETA ALTEBENAĴO" ELDONITA


La nomita libro, en kiu estas sistemike prezentitaj kuracaj herboj tradicie uzataj en Tibeto, estas eldonita lastatempe en Hining de Kinghaj-provinco en la lingvoj tibeta kaj hana.

La libro estis kompilita de botanikistoj kun la helpoj de multaj tibetaj kuracistoj. La tuta libro konigas 455 specojn de tibetaj kuracaj herboj. Pri ĉiu herbo oni notis ĝiajn nomojn tibetan, hanan kaj latinan kaj ĝiajn ĝenron kaj familion kun preciza kaj detala bildo kaj morfologia priskribo, ĝiajn produktejojn, metodojn de kolektado kaj prilaborado kaj ĝiajn efikojn. En la libro oni speciale pritraktas preparajn metodojn de tibetaj medikamentoj kaj kolektis tibetajn receptojn. Ĝi estas relative bona konsultlibro kaj ankaŭ liveris bazajn materialojn por esplori tibetajn kuracajn herbojn kaj por ekspluati kaj utiligi animalajn kaj plantajn fontojn sur la Kinghaj-Tibeta Altebenaĵo.

La tibetaj medicino kaj farmacio estas konsistigaj partoj de la ĉina medicina kaj farmacia trezoro. Ĝi fontas el la hanaj medicino kaj farmacio kaj senĉese disvolviĝis dum longa batalado de tibetanoj kontraŭ malsanoj.

LONG LIN:

# Vojaĝo sur stepo



*Ventomova akvolevilo*

MATENE, ni ekveturis per aŭto de la urbo Huhehoto orienten laŭ la piedo de la grandioza Daking-monto kaj, post unu kaj duona tagoj atingis Hianghuang-hoŝoon (hoŝoo egalas al gubernio), kiu estas avangarda unuo de la Interna Mongolio en lerno de Daĝaj en agrikulturo. Tie ni pasigis unu semajnon plezure, kaj multaj novaj aspektoj de la stepo forte nin impresis.

### KONSTRUO DE HERBEJOJ

La stepo en julio verdas kiel gazono. Sur la senlima vastaĵo dislokiĝas novaj loĝejoj, kaj paŝtistoj sur ĉevaloj paŝtas gregojn de grasaj ŝafoj svingante vipon. Okulfrapaj estas ankaŭ kontraŭbrutaj bariloj el ŝtonoj aŭ pikdratoj kun betonaj palisoj. La bariloj serpente etendiĝas malproksimen trans ondantajn montetojn kaj ebenejon kaj ĉirkaŭas herbejojn por ilin protekti de la gregoj. Tiuj herbejoj servas ĉefe por produkti fojnon necesan por nutri la brutojn en vintro kaj printempo. Iuj komunumoj kaj brigadoj ankaŭ faras en ili irigaciajn konstruaĵojn kaj forstumadon kaj kulturas grenplantojn kaj bonspeciajn herbojn por fojno. Tiu rimedo havas gravan signifon por protekti kaj racie uzi herbejojn kaj rapidigi la disvolviĝon de brutobredado kaj pretigis bazon por praktiki alternan paŝtadon en la estonteco.

La nomita hoŝoo troviĝas sur stepo kun malvarmo, ofta vento, sekeco kaj maldensaj kreskaĵoj. Antaŭ la Liberiĝo, la paŝtistoj vivis sklave en subpremado de la Kuomintanga reakcia registaro, princoj, aristokratoj kaj brutoposedantoj. Post la Liberiĝo, la paŝtistoj fariĝis mastroj de la stepo kaj suriris la vojon de kolektivigo, kaj la brutoj multiĝas jaron post jaro. Sed kun la kresko de la brutaro ofte mankis herbo en vintro kaj printempo, kaj la nombro de brutoj malkreskis je okazo de granda plago. Kvankam la popola registaro helpis la paŝtistojn per greno kaj fojno transportitaj de milojn da kilometroj fore, tamen tio ne povis solvi la tutan problemon kaj paŝtistoj devis peli la brutojn al lokoj malproksimaj por paŝti nomade.

En la Granda Proleta Kultura Revolucio, leviĝis alta tajdo de lerno de Daĝaj en agrikulturo tra la tuta lando. La revolucia spirito de la Daĝaj-anoj en batalo kontraŭ la naturo kaj ŝanĝo de malriĉa vilaĝo en novan socialisman vilaĝon multe edukis la kadrojn kaj komunuma-

nojn de tiu ĉi loko kaj ilin kuraĝigis tio, ke Uŝinĝu-komunumo, la avangarda unuo en lerno de Daĝaj, konstruis herbejojn kaj akcelis la disvolviĝon de brutobredado. Aŭtune de 1971, la gvidantoj de la hoŝoo profundiĝis en la bazajn unuojn kaj kunvokis kunsidojn por peti opiniojn de amasoj. Ili decidis gvidi la popolanojn de la tuta hoŝoo en pluapaŝa disvolvo de la movado de lerno de Daĝaj kaj preni reformon kaj konstruon de la stepo kiel sian grandan socialisman aferon. Namra, sekretario de la partia komitato de la hoŝoo, venis al la produkta brigado Bogdingol kaj decidis konstrui herbejon sur montdeklivo apud la vilaĝo post interkonsiliĝo kun la brigada partia filio. Sed iuj oponis kontraŭ tio. Maljunuloj timis, ke movo de ŝtonoj de la "dia monto" kaŭzos malfeliĉon, kaj iuj opiniis, ke estas tro malfacile konstrui herbejon pro nesufiĉeco de laborfortoj de la brigado. Por konvinki la amasojn per fakto, sekretario Ĉogĝil de la partia filio kun 27 paŝtistoj sub sia gvido supreniris la monton por haki ŝtonojn kaj ankaŭ Namra ofte venis al la konstruejo por fari fizikan laboron. Tio multe kuraĝigis la amasojn. En vintro ili finkonstruis herbejon ĉirkaŭbaritan per ŝtona muro je 2,300 metroj longa. En la sekvinta jaro okazis sekeco kaj velkis herboj ekster la herbejo, dum interne de ĝi oni tamen kolektis pli ol 30,000 kilogramojn da herboj kaj pli ol 100 maljunaj kaj malfortaj brutoj povis sin paŝti en vintro kaj printempo. La fakto edukis la paŝtistojn. Poste ili konstruis 5 pliajn herbejojn, en kiuj ili ankaŭ faris forstumadon kaj kulturis bonspeciajn herbojn kaj grenplantojn, tiel ke la brigado finis la historion de nomada vivo kaj la totala nombro de brutoj kreskis 3-oble kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo.

Tiu sperto de la brigado estis rapide disvastigita tra la tuta hoŝoo. Ĝiaj komunumoj kaj brigadoj mobilizis amasojn kaj organizis specialajn grupojn por multe konstrui tiajn herbejojn. Nun, en la hoŝoo jam konstruiĝis herbejoj kun areo de 60,000 hektaroj kaj la fojno kaj greno rikoltitaj en ĉiu jaro kiel nutraĵo de brutoj jam fundamente sufiĉas por kontentigi la bezonon kaj finiĝis la nomadismo en miloj da jaroj kaŭzita de katastrofoj, kaj la nombro de brutoj kreskis multege.

## AMBICIO DE LA PAŜTISTOJ

Dum la vizitado ni vidis akvoutiligajn konstruaĵojn kaj aŭdis multajn kortuŝajn rakontojn pri konstruantoj.

Hianghuang-hoŝoo estas akvomanka regiono, ĝia jara meznombra precipita kvanto estas nur



*Iu loĝpunkto de paŝtistoj*

250 milimetroj, dum la vaporiĝa kvanto de akvo estas 2,500 milimetroj. En ĝi troviĝas neniu rivero kiu havas akvon en la tuta jaro. Antaŭ la fondiĝo de la popolaj komunumoj, al ĝiaj homoj kaj brutoj mankis akvo. Poste paŝtistoj boris pli ol 1,000 akvoputojn sin apogante sur la kolektivaj fortoj kaj unuapaŝe ŝanĝis la staton de akvomanko. Sed, kun la senĉesa pliiĝo de brutoj kaj precipe la konstruo de herbejoj, la fositaj putoj jam ne sufiĉis por kontentigi la bezonon. Kun ambicio pri konstruado de la stepo la paŝtistoj komencis fari novajn akvoutiligajn konstruojn. Ili diris poezie: "Agate ruĝas la paŝtista koro, smeralde verdas la herbejkoloro; aspiron aglan havas la paŝtistoj, ŝafarojn nube blankajn havas stepo."

15 junulinoj de la produkta brigado Hadenhoŝoo rompis la katenon de malnova penso kaj organizis sin en Ferknabinan Grupon por konstrui la stepon. Same kiel viroj, ili malgraŭ vintra frosto kaj somera varmego, masonis ŝtonan kontraŭbrutan muron je 25,000 metroj longan ĉirkaŭ herbejo kun areo de 1,000 hektaroj, boris 25 putojn kaj konstruis baraĵon por utiligi subteran fluon en kvar jaroj. Tiu grupo fariĝis lerninda ekzemplo de la virinoj de la tuta hoŝoo.

La komunumanoj de la produkta brigado Haŝat konstruis, nur en tri monatoj, akvokondukan sistemon inkluzive 180-metran tunelon, 700-metran kanalon kaj 500-metran riverbaraĵon. En la komenco de la konstruado ili renkontis malfacilojn kiel frostecon, rokfalojn ktp., precipe ili ne posedis teknikon por masoni tunelon, sed kun firma volo kaj per diligenta lernado ili venkis malfacilojn unu post alia kaj finfine sukcesis konduki akvon el la lago Olannor al dezerta monteto je 15 metroj alta.

Nun, la tuta hoŝoo havas diversajn akvoutiligajn konstruaĵojn. La stepo suferanta de sekeco en mil jaroj nun havas murmurajn akvofluojn kaj multaj dezertejoj fariĝis oazoj.

## DISVASTIGO DE NOVA TEKNIKO

Sur la vasta stepo, nian atenton ofte altiris al si gregoj de grasaj ŝafoj kun fajna lano. Ili estas bonrasaj ŝafoj reformitaj en la Granda Proleta Kultura Revolucio. Dank' al apliko de nova tekniko de arta parigo la paŝtistoj ŝanĝas malbonajn brutojn en bonrasajn kun bonaj lano, viando kaj lakto.

Antaŭtagmeze de iu tago ni vizitis Hongkibrigadon, kiu plej frue praktikis bonrasigon de ŝafoj. Jam de multaj jaroj la brigado persistis pri kulturado de bonrasaj ŝafoj aplikante sciencajn metodojn en nutrado kaj administrado, tiel ke ĝiaj ŝafoj estas centpocente bonrasaj. Sed en la komenco multaj paŝtistoj timis, ke la viando kaj lakto de la reformitaj ŝafoj estos malpli bongustaj ol tiuj de la lokaj ŝafoj. Sed poste ili estis konvinkitaj de la finfina sukceso. Nun la brigado havas tri parigajn staciojn, kies parigistoj estas el paŝtistoj kaj laboras tiel serioze, ke ili starigis al ĉiu ŝafo karton por registri la kategorion, naskodaton, parigan staton k.a. La fajnlana ŝafo elkulturita de ili jam atingis la difinitan normon de la ŝtato. En la hoŝoo ĝenerale fondiĝis brutoreformaj kaj veterinaraj stacioj, kaj ĉiuj komunumoj kaj brigadoj havigis al ŝafoj kaj bovoj stalojn kaj al brutidoj varman ĉambron. En 1976, 53% de la brutoj kaj 70% de la ŝafoj de la hoŝoo estis reformitaj. Krome, kun la disvastigo de la tekniko de fridigo de spermo, multe plirapidiĝis la bonrasigo de bovoj. Tio multe levis la kvaliton kaj valoron de brutoj. Ekzemple la produktokvanto de lano de reformita ŝafo multiĝis du-kvaroble kaj ĝia valoro kreskis trikvinoble kompare kun tiuj de la loka ŝafo.

En la lastaj jaroj ankaŭ mekanikigo de brutobredo ricevis rapidan disvolviĝon. Kamionoj, traktoroj kaj diversaj maŝinoj uzataj por brutobredo plimultiĝas kaj plialtiĝas la nivelo de mekanikigo de herbofalĉo, herbokolekto, lantondo, prilaboro de lakto, dispecigo de fojno kaj desinfekta bano de brutoj. Estas pli kaj pli vaste uzataj la maŝinoj por pumpado kaj elektroproduktado per vento kaj maŝinoj por asperga irigaciado.

La konstruado de la stepo, bonrasigo de brutoj kaj mekanikigo en brutobredado ebligis al la hoŝoo la totalan meznombran plimultiĝon de brutoj je 34% kaj netan pliiĝon je 4.2% en ĉiu jaro ekde 1971. La paŝta afero antaŭen marŝas en direkto de stabileco, bonkvaliteco kaj altprodukteco.

## GASTADO EN PAŜTISTA HEJMO

En la pasinteco, oni ofte diris: "La hejmo de la paŝtistoj troviĝas sur la dorso de ĉevaloj." Hodiaŭ, tiu diro jam ne konvenas. Plejparto de la paŝtistoj de la Interna Mongolio jam loĝas en domoj anstataŭ pasintaj jurtoj kaj la paŝtistoj de la nomita hoŝoo jam tute efektivigis fiksan loĝadon.


Iam ni gastis en la hejmo de Damba, kiu regalis nin per laktoteo kaj kazeo. Tiu 61-jara maljunulo kun 7 familianoj loĝas en triĉambra domo, kies muroj estas nove blankigitaj kaj kies fenestroj havas du tavolojn da vitro. Sur la terlitoj sterniĝas tapiŝoj nacistilaj. En la ĉambroj sin trovis kestoj, kudromaŝino, biciklo, radioricevilo ktp. Li diris kun rideto: "Ni eĉ neniam sonĝis, ke ni ĝuos tiel feliĉan vivon." Antaŭ la Liberiĝo, liaj familianoj ĉiuj estis sklavoj. Li fariĝis paŝtisteto en la aĝo de ok jaroj. Tiam li sin vivtenis per fermentita laktofeĉo kaj sin vestis per ĉifona ŝafpelto. Antaŭ la Liberiĝo li ofte suferis baton kaj insulton. Hodiaŭ, lia pliaĝa filo laboras en la urbo Huhehoto, liaj ceteraj tri infanoj vizitas lernejon, dum li kaj lia edzino laboras en la produkta brigado.

Dum la vizitado ni informiĝis, ke la vivo de la paŝtistoj multe ŝanĝiĝis dank' al la fiksloĝado. En la pasinteco la malriĉaj paŝtistoj loĝis en jurtoj malaltaj, malvastaj kaj frostaj, dum hodiaŭ ili vivas en domoj komfortaj kaj vastaj en kiuj estas varme en vintro kaj malvarmete en somero.

Kaj dank' al tio, en ĉiu brigado fondiĝis elementa lernejo; altklasaj geknaboj loĝas kaj lernas en lernejo kaj malaltklasaj infanoj lernas ĉeloke, kaj instruistoj rondire donas lecionojn al ili, tiel ke la elementlerneja eduko ĝeneraliĝis en la tuta hoŝoo. La lernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj jam konsistigas kvaronon de la tuta loĝantaro.


En ĉiu brigado instaliĝis magazeno, por ke la paŝtistoj povu aĉeti ĉiutagajn bezonaĵojn kaj interŝanĝi produktaĵojn ĉeloke. Sed antaŭ la Liberiĝo, la paŝtistoj devis iri kelkdek kilometrojn por aĉeti alumetojn kaj salon kaj ofte suferis ekspluaton de spekulantoj. Tiam ili devis doni unu ŝafon kontraŭ unu tebriko kaj unu bovon kontraŭ paro da botoj. Hodiaŭ tia fenomeno jam forpasis por eterne.

Dank' al la fiksloĝado, la vivkondiĉo de la paŝtistoj pliboniĝis kaj dank' al ĝeneraligo de la sistemo de koopera kuracado kaj servo de "nudpiedaj" kuracistoj, rimarkinde malmultiĝis malsanoj kaj la loĝantaro de tiu loko kreskis evidente. La antaŭa dezerta stepo jam fariĝis prospera kaj vivecplena.



*Kadroj kaj paŝtistoj de Hianghuang-ajmago konstruas ĉirkaŭmuron de herbejo.*

*Trinkejo por brutoj*



HISTORIAJ OBJEKTOJ


# Grava arkeologia eltrovo en la Interna Mongolio

de GAJ ŜANLIN

LA Interna Mongolio estas loko kie loĝis la ĉinaj historiaj nacimalplimultoj la hunoj, uhuan-oj, sianbej-oj, tuĝjue-oj, njuĝen-oj, ĉidan-oj kaj mongoloj. Tie estas tre multaj historiaj restaĵoj ĝis nun troveblaj. De multaj jaroj la arkeologia fako de tiu loko aktive faris elterigadon kaj protektadon al historiaj restaĵoj kaj elfosis multajn historiajn objektojn. Interalie, oni elterigis en Liangĉeng-gubernio sigelilojn de uhuan-aj kaj sianbej-aj ĉefoj en la Okcidenta Gin-dinastio (265 — 420 p.K.), du argilajn barelojn da porcelanaĵoj de Juan-dinastio alportitaj de interna kaj suda partoj de Ĉinio en antaŭurbo de Huhehoto kaj silkaĵojn produktitajn de interna parto de Ĉinio trovitajn en hunaj tomboj de la Epoko de Militantaj Regnoj en Hangin-hoŝoo (gubernio) de Ikeĝaŭ-ajmago (subregiono). Kaj krome en la jaro 1972 oni ordigis tombon kun freskoj de la Orienta Han-dinastio (25 — 220 p. K.) en Horinger kaj eltrovis dum la periodo de 1964 ĝis 1976 parton de la Granda Muro konstruitan en Kin- kaj Han-dinastioj (221 a. K. — 220 p. K.) en la Interna Mongolio.

## FRESKOJ DE HORINGER

La granda tombo kun freskoj de la Orienta Han-dinastio de Horinger sin trovas en Horinger-gubernio je 100 kilometroj oriente de la urbo



*Muro konstruita en la regperiodo de Vudi de la Okcidenta Han-dinastio (140 — 87 a. K.) en norda parto de Ĉoghoŝoo*

Huhehoto. La tombo estis priŝtelita en la pasinteco, sed la freskoj sur la muroj en la tombo restas ĝenerale sendifektaj. Tie estas entute pli ol 40 serioj da koloraj freskoj kun totala areo de pli ol 100 kvadrataj metroj. Per bildserioj la pentristoj detale priskribis la travivaĵojn de la mortinto kaj produktajn aktivadojn de la laboraj popolanoj sklavigitaj de li.

La bildoj montras, ke la mortinto iam servis kiel ŝtata oficisto en la ĉefurbo de la Orienta Han-dinastio Luojang, poste estis sendita al ĉina norda regiono kie mikse loĝis nacimalplimultoj por labori kiel guberniestro k. s. kaj fine la centra registaro de la Orienta Han-dinastio nomumis lin plej alta administranto de la naciminoritatoj uhuan k. a. Pluraj bildoj montras donon de povosimbola bastono fare de Imperiestro de la Orienta Han-dinastio al li. Kaj per la ricevita rajto li povis ordoni tiuloke kiel reprezentanto de la centra registaro.

Tiuj freskoj kun tre granda formato, kun multaj surskriboj kaj diversaj enhavoj estas vere raraj inter la trovitaj en tomboj de Han-dinastio. Ili figure kaj realisme spegulas la naciecajn interrilatojn kaj socian fizionomion en la norda regiono, kie mikse loĝis naciecoj en la malfrua periodo de la Orienta Han-dinastio, kaj diversajn facetojn de la socia vivo de tiu dinastio. La bildoj prezentas interalie scenojn de produkta laboro kiel paŝtadon de ĉevaloj, agrikulturon kaj plukadon de morusfolioj; antikvajn konstruaĵojn kiel urbojn, bienojn, pontojn kaj pasejojn; socian aktivadon kiel kantadon, dancadon kaj foiran negocon kaj historiajn rakontojn. Koncerne la klasajn rilatojn, la freskoj prezentas jenajn scenojn de klasa subpremado: kiam la sinjoro ekskursis, li havis grandan sekvantaron rajdantan; kiam li revenis hejmen, li ĝuis abundan manĝon, servadon de multaj sklavoj kaj amuzadon de kantistoj kaj dancistoj; sed la malriĉaj laboruloj devis aŭ penlabori surkampe kaj paŝtadi en valoj, aŭ sin okupi per pezaj servoj en la domoj de bienuloj kaj ŝtataj oficistoj.


La freskoj spegulas ankaŭ solidaran kunlaboradon de laboraj popolanoj de la hana kaj nordaj frataj naciecoj de la antikva Ĉinio en ekspluatado de la norda parto de nia patrolando. Unu el la freskoj en la tombo prezentas kvadratan konstruaĵon kaj la surskribaĵo montras ke ĝi estas bazaro por komercado inter hanoj kaj nordaj nacimalplimultoj. Tiuj naciecoj estis same regataj de la centra registaro de la Orienta Han-dinastio kaj havis multajn rilatojn inter si en ekonomio, kulturo kaj kutimoj.

La freskoj montras, ke la ekonomia strukturo de tiu regiono ĝenerale similis al tiu de interna Ĉinio kaj tamen havis sian apartan karakterizaĵon, kaj la urbaj konstruaĵoj, dancoj, akrobataĵoj kaj aliaj artoj estas samaj al tiuj de interna Ĉinio. En ideologio la reakcia ideologio de

*Paŝtado de bovoj (kopiaĵo)*



*Paŝtado de ŝafoj (kopiaĵo)*



la feŭda reganta klaso ankoraŭ estis uzata kiel spirita kateno al la hanoj kaj nacimalplimultoj.

La freskoj en la tombo de Han-dinastio estas arta kristalo de sango kaj ŝvito de la diversnaciecaj laboraj popolanoj en la antikva Ĉinio kaj spegulas la saĝon kaj eminentan arton de la popolaj pentristoj. La uzita materialo estis prenita el la reala vivo kaj impresas per intensa vivetoso. Ilia strukturo estas natura kaj viveca, la strekoj estas fortaj kun glataj turniĝoj, kaj sufiĉa lerteco estas montrita en uzado de koloroj.

La freskoj en la tombo de la Orienta Han-dinastio de Horinger en la Interna Mongolio estas historiaj pentraĵoj pri la antikva multnacieca Ĉinio.

## LA ANTIKVA GRANDA MURO

La Granda Muro estas unu el la plej grandaj militaj konstruaĵoj de la antikva Ĉinio. En antikveco Ĉinio konstruis multajn longajn kaj mallongajn murojn por defendi la landon. Tiuj muroj ludis gravan rolon en unuiĝo kaj disvolviĝo de la multnacieca Ĉinio.

Arkeologoj de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio faris plurajn esplorojn pri la muroj de la Periodo de Militantaj Regnoj kaj Kin- kaj Han-dinastioj (475 a. K. — 220 p. K.) en tiu regiono kaj akiris klaran konon pri la dislokiĝo, direkto, strukturo kaj rolo de tiuj muregoj.

En Jinŝan-montaro kaj sude kaj norde de ĝi en la nuna Interna Mongolio troviĝas tiaj muregoj. Ĉe la suda piedo de tiu montaro sin trovas tera muro de la regno Ĝaŭ de la Periodo de Militantaj Regnoj (475 a. K. — 221 a. K.). Ĝi estas alta je 4-5 metroj kaj rame konstruita el tero kaj ŝtono ĉe valobuŝoj kaj aliaj gravaj lokoj. Laŭ historia literaturo, tiu muro estis daŭre uzata kaj plilongigata en Han-dinastio.

En Jinŝan-montaro troviĝas muro de Kin-dinastio. Ĝi estis konstruita el tero per ramado aŭ masonita per ŝtonoj. Ĝi altas je 6 ĝis 7 metroj kaj estis daŭre uzata en Han-dinastio. Tiu murego trapasas la nordan piedon de Daking-monto kaj iras okcidenten al la suda piedo de Vula-monto kaj Langŝan-monto. Ĝia parto ĉe Langŝan-monto estas konstruita el ŝtonoj sur krutaj deklivoj kaj rokmuroj, tial rigardate de norde ĝi aspektas aparte alta kaj rigardate de alte en la sudo ĝi aspektas tre impona zigzaganta sur altaj montoj kun sennombraj ravinoj. Turoj de alarma fajrosignalo pri milito estas konstruitaj ĉe intervideblaj punktoj de la murego sur montpintoj kun distanco de kelkaj lioj (1 lio = 1/2 km.) kaj urbetoj estis konstruitaj ĉe punktoj kun distanco de kelkaj lioj.

Norde de Jinŝan-montaro troviĝas restaĵoj de du grandaj muroj irantaj de oriento al okcidento kun interspaco de dekkelkaj aŭ kelkdek lioj, kiuj iras okcidenten ekde Ĉog-hoŝoo en la nordokcidenta parto de la Interna Mongolio. Ili estis konstruitaj dum la regado de Imperiestro Vudi (140 — 87 a. K.) de Han-dinastio.

En Ĉog oni malkaŝis subtere en dezerto proksime de la limo inter Ĉinio kaj la Mongola Popola Respubliko ŝtonan urbon nomatan Ĉoloĥun. En la urbo troviĝas dekoj da fundamentoj de domoj kaj oni elfosis platajn kaj tubajn tegolojn, tegolfinojn kun ĉinaj ideografiaĵoj signifantaj "vivu eterne", arbalestojn, ferajn kirasplatojn, restaĵon de glavo, tenilon de ŝildo kaj aliajn armilojn. Laŭ la elterigita skorio de bronzo oni konjektas ke malgrandaj bronzaj objektoj kiel bronzaj sagpintoj estis faritaj ĉeloke. Laŭ la elterigitaj moneroj "vuĝu" oni konstatis, ke tiu murego estis uzata ĉefe en la meza epoko de la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K. — 24 p. K.). Laŭ la trovitaj feraj agrikulturiloj, oni povas tiel diri, ke la garnizono kaj popolo de tiu loko havis relative stabilan periodon por defendi kaj ekspluati la nordan limregionon de la patrolando.

En Ĉinio, ĉu en la suda, norda aŭ en la meza parto, troviĝas restaĵoj de muregoj. Frue en la Periodo de Militantaj Regnoj, la regnoj Ki, Ĉu, Jan, Kin, Ĝaŭ kaj Vej ĉiuj konstruis muregon pro ofteco de militoj, por ataki kaj sin defendi. Laŭ la formo kaj rolo de la granda muro, ĝi estas konstruaĵo disvolviĝinta el antikva urbomuro de nia lando.

Laŭ la historiaj restaĵoj oni konstatis ke la elterigitaj objektoj sude kaj norde de la grandaj muroj de Kin- kaj Han-dinastioj ne havas rimarkindan diferencon inter si, kaj la hunoj, hanoj kaj aliaj naciecoj loĝantaj sude kaj norde de ili estis niaj enlandaj naciecoj, ĉu ili siatempe estis unuigitaj de Kin- kaj Han-dinastioj aŭ ne. Tial la grandaj muroj estis nek limoj inter la nacioj aŭ limoj inter terkulturaj kaj paŝtaj regionoj, nek landlimoj, sed militaj konstruaĵoj de la antikva Ĉinio.

La historiaj restaĵoj malkovritaj en la Interna Mongolio kaj spegulis la apartajn kulturajn karakterizaĵojn de la ĉinaj naciecoj kaj montris la interrilatojn politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn inter niaj naciecoj en antikva tempo. La nacimalplimultoj kaj hanoj vivantaj de antikveco en tiu vasta regiono kreis kune la longan historion kaj la brilan antikvan kulturon de la patrolando.

# Kreskado de du junaj matematikistoj

JANG Le kaj Ĝang Guanghoŭ estas junaj matematikistoj elkulturitaj post la fondo de la nova Ĉinio. En sia knabeco, ili ricevis zorgon kaj flegadon de la ŝtato, fariĝis junaj pioniroj, samtempe eniris en la Pekinan Universitaton kaj studis kune en sama klaso. Post diplomitiĝo ili ambaŭ laboris en la Matematika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj kune studis pri fundamentaj teorioj de matematiko. De multaj jaroj ili kunlaboras en studo pri la teorio de funkcioj, unuafoje eltrovis konkretajn rilatojn inter la du ĉefaj konceptoj en la valordistribua teorio de meromorfika funkcio deficita valoro kaj singulara direkto kaj pro tio ricevis laŭdojn de matematikaj rondoj en- kaj eksterlandaj.

La studo pri la valordistribua teorio de funkcio komenciĝis antaŭ ĉ. cent jaroj. En la periodo de la fino de la lasta jarcento ĝis la tridekaj jaroj de tiu ĉi jarcento iom post iom formiĝis la ĉefaj studaj objektoj kaj konceptoj de tiu scienca branĉo kiel ekzemple deficita valoro kaj singulara direkto. En- kaj eksterlandaj specialistoj pri la funkcia teorio faris longan kaj grandampleksan studon pri tiuj du konceptoj kaj akiris multajn bonegajn fruktojn. Sed en la pasinteco, tiuj du konceptoj estis traktataj kiel seninterrilataj konceptoj, kaj tio malrapidigis la studon. Jang Le kaj Ĝang Guanghoŭ studis en- kaj eksterlandan literaturon pri tiu studo kaj decidis antaŭenpuŝi la laboron komencitan de la pioniroj. En 1971, Jang Le elmetis la ideon trovi ian regulon de singulardirekta distribuo kun deficita valoro kiel kondiĉo, kaj tio tuj estis aprobita de Ĝang Guanghoŭ. Kaj la du junuloj komencis grimpi sur sciencan pinton. Post penlaborado de pli ol unu jaro ili sukcesis kaj publikigis la frukton de sia studo en la gazeto «Sciencoj de Ĉinio».

Kiamaniere pligrandigi la atingon? Tiam ili ankoraŭ ne konis la konsekvencan ekziston de interrilato inter deficitaj valoroj kaj singularaj direktoj kaj ĉiamaniere klopodis por forigi deficitan valoron opiniante ke ĝi estas nur kondiĉo aldonita de homo kaj intencis trovi ĝeneralan leĝon post ĝia forigo. Tial ilia studo renkontis grandan obstaklon. Ili uzis ĉiajn troveblajn rimedojn, sed ne sukcesis.

En iu mateno de frua vintro de 1973, Ĝang Guanghoŭ biciklis al la instituto. Li pensadis survoje pri la jus publikigita disertacio kaj subite

*Ĝang Guanghoŭ (maldekstre) kaj Jang Le*



fulmis ideo en lia cerbo: Ĉu oni povas studi la konceptojn de deficita valoro kaj singulara direkto en interligo? Veninte en la instituton li tuj diris sian ideon al Jang Le. La du junuloj refoje komencis kune studi verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kaj filozofiajn verkojn de Prezidanto Maŭ. Ili ekkonis iom post iom ke ankaŭ en matematika studo ekzistas batalo inter la mondkoncepto de materiisma dialektiko kaj tiu de metafiziko. Laŭ materiisma dialektiko, ĉio en la mondo enhavas du kontraŭajn flankojn, kiuj **"pro certaj kondiĉoj, unuflanke, kontraŭstaras unu la alian, kaj, aliflanke, interligiĝas, interkomunikiĝas, interpenetriĝas kaj interdependas".** Analizinte la du konceptojn de deficita valoro kaj singulara direkto per dialektika materiisma vidpunkto, ili vidis ke ĝuste ili formas paron da kontraŭaĵoj koneksaj. La tradicia studo nur vidis ilian kontraŭstaron sed ne rimarkis ilian interligon. Inspirite de marksismaj klasikaj verkoj, ili komencis serĉi dialektikan interrilaton inter tiuj du konceptoj kun firma fido.

Kiam Jang Le kaj Ĝang Guanghoŭ estis absorbitaj de matematika studo, la "kvarpersona bando", por subfosi la modernigon de la industrio, agrikulturo, nacidefendo kaj sciencoj kaj teknikoj kaj uzurpi la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato, distrumpetis energie, ke "la fundamentaj teorioj estas senutilaj". Jang Le kaj Ĝang Guanghoŭ pensis: La grandioza projekto de modernigo de industrio, agrikulturo, nacidefendo kaj sciencoj kaj teknikoj de nia lando en tiu ĉi jarcento estas elmetita de Prezidanto Maŭ kaj proklamita de Ĉefministro Ĝoŭ en la Kvara Tutlanda Popola Kongreso. Kiel oni povos efektivigi la idealon, se oni ne bone studis la fundamentajn teoriojn? Pensante pri la multjara flegado de la Partio pri ili, ili profunde sentis, ke kontribui siajn fortojn al efektivigo de la projekto estas glora devo de la sciencaj laborantoj. Kiel ili povas halti! Ili ignoris la absurdaĵojn de la "kvarpersona bando" kaj daŭrigis sian sciencan studon. Ĝang Guanghoŭ ĵus resaniĝis de retinito. Kuracisto admonis lin malmulte legi, multe ripozi kaj atenti pri sia sano kaj Jang Le meminiciate prenis sur sin pli multe da rutinaj laboroj. Sed Ĝang Guanghoŭ daŭre konsultis materialon kaj faris kalkulojn kaj neniam volis ripozi. Tiuj du junuloj multfoje laboris tra tuta nokto sub lampo. Finfine Jang Le kaj Ĝang Guanghoŭ sukcesis fari gravan trarompon en studo de la valordistribua teorio de funkcio. Aplikante la unuiĝan leĝon de kontraŭaĵoj de Marksismo ili malkovris la konkretan interligon inter la deficitaj valoroj kaj singularaj direktoj, formis formulon pri la interrilato inter la nombro de deficitaj valoroj kaj tiu de singularaj direktoj kaj sukcese interligis tiujn du sferojn longe apartigitajn. Kaj krome en studo pri la sfero de deficitaj valoroj kaj tiu de singularaj direktoj, ili akiris gravajn fruktojn kun avangarda nivelo de la mondo. Ekzemple, ili solvis la longe ekzistantan problemon pri distribuo de singularaj direktoj en la internacio kaj ankaŭ ricevis precizan rezulton de takso pri la nombro de deficita valoro. Ilia studado ankaŭ elmetis multajn novajn studobjektojn pri la valordistribua teorio de funkcio.

Ĉiu longa vojaĝo komenciĝas de unua paŝo. Kiam Jang Le lernis en mezlernejo, li jam havis fortan inklinon al matematiko. Per solida laboro iom post iom li metis firman fundamenton kaj ne strebis al alta neatingebla ambicio. Krom ellerno de siaj matematikaj lecionoj, li legis ankaŭ koncernajn matematikajn librojn kaj senĉese firmigis siajn sciojn kaj altigis sian kapablon de analizado kaj solvado de problemoj per farado de ekzercoj. Kaj kun tiu bona stilo li eniris universitaton. Poste, kiam li laboris en la Matematika Instituto, li ofte legis materialon eĉ en feriaj tagoj.

La travivaĵo de Ĝang Guanghoŭ estas relative komplika. Aŭskultu lian propran rakonton: "Kiam mi lernis en la sesa klaso, mia hejmloko Tangŝan liberiĝis kaj mi ekhavis la kondiĉon por plua studo. Sed mi ne gajnis bonan poentaron en matematiko kaj malsukcesis en la ekzameno por eniri mezan lernejon. Mia patro, kiu estis karboministo, diris al mi, ke antaŭ la Liberiĝo laboristaj infanoj en mia aĝo povis nur okupiĝi pri kolektado de rubaĵoj, kaj ili tute ne havis la eblecon de vizito de lernejo. Nur post la Liberiĝo, kiam la laboristoj fariĝis mastroj, iliaj geknaboj ekhavis ŝancon por lerno. Li diris, ke ni infanoj devas lerni diligente por glorigi la

patrion. La vortoj de mia patro profunde enradikiĝis en mia koro." De tiam li diligentiĝis. Iom post iom li interesiĝis pri matematiko kaj gajnis altan poentaron. En la universitato, li lernis nur la anglan kaj rusan lingvojn. Por studi teorion de funkcio en la instituto, li bezonis legi la francan lingvon. Ankaŭ tio estas fundamenta scio. Avide li studis ĝin kaj fine li posedis ankaŭ tiun fremdan lingvon.

Jang Le kaj Ĝang Guanghoŭ neniam povas forgesi la instruadon de niaj veteranaj matematikistoj kaj la helpon de la kamaradoj al ili. La seriozeco kaj rigoreco de la forpasinta Profesoro Hjong Kinglaj kaj Profesoro Ĝuang Kitaj de la Matematika Fakultato de la Pekina Universitato donis profundan influon al tiuj du junuloj. La profesoroj estis tre rigoraj al ili, kaj iliaj disertacioj estis foje kaj refoje redonitaj al ili, por ke ili kiel eble plej perfekte montru la fruktojn de sia studo. Iafoje, la prezentita disertacio havis nur 20 paĝojn, tamen la bone pripensitaj konsilaj notoj de la du profesoroj plenigis 10 paĝojn. Kiam ili atingis gravajn sukcesojn kaj ĉiutage ricevis gratulajn leterojn el diversaj lokoj de la patrolando, ili profunde sentis, ke la sukceso estas nedisigebla de la helpo, kuraĝigo kaj instigo de la kamaradoj.

Ili jam sukcesis surgrimpi unu altan montpinton en scienco, kaj ankoraŭ multaj pli altaj ilin atendas. Ili plue marŝos.

# "Nudpieda" kuracisto de jaŭ-a nacieco

de **LIN FENG**

Estis vespero en vilaĝo de Tiandong-gubernio, Guanghi.

Ekstere fulmotondris kaj torente pluvegis. Jaŭ-a "nudpieda" kuracisto Huang Dahian ĵus revenis post rondirado kuraca. Kiam li ĵus kuŝiĝis en la lito, subite aŭdiĝis urĝa frapado je la pordo kaj alvoko: "Dahian, Dahian! Grave malsaniĝas infano de Huang Mamian de nia taĉmento. Bonvolu tuj iri helpi!" Huang Dahian rapide eksaltis el la lito, malfermis la pordon kaj vidis, ke la vizitanto estas Maj Ginĉang, estro de la kvara produkta taĉmento.

La grava malsano de infano de malriĉkamparano kvazaŭ fajro bruligis al Dahian la koron. Li forgesis sian lacon de rondirado en pluvego, rapide kaptis pluvmantelon kaj medikamentan keston kaj malfacile marŝis al la kvara taĉmento, lumigante la glitan vojon per poŝlampo. Por atingi la hejmon de Huang Mamian, li devis iri ĉirkaŭ 3 kilometrojn sur montvojeto kaj trapasi tri valojn. Tiutempe la pluvego rapide kunfluis laŭ la valoj kiel muĝantaj torentoj.

Kiam Huang Dahian travadis la unuan valon, la akvo profundis ĝis lia talio. Kiam li estis trapasonta la lastan, la akvo jam ŝvelis super la pinto de fragmitoj kreskantaj ambaŭflanke de la fluo. Travadi ĝin estus tro danĝere. Sed mankis al li tempo por atendi ĝis forfluo de la torento, se la kuracado ne estu tro prokrastita. Li senhezite demetis siajn vestojn, ligis ilin kun la medikamenta kesto, portis la ligaĵon sur la kapo kaj komencis enakviĝi, kaptante la fragmitojn. Maj Ginĉang, kiu lumigis la vojon per poŝlampo, ekdiris: "Danĝere! Prefere iom atendu!" Huang Dahian firme respondis: "Mi ne timas." Tuj post la vorto, la torento jam puŝis lin pli ol tri metrojn foren. Li dume kaptis fragmitojn ĉe la transa bordo kaj sukcesis surbordiĝi.



*Huang Dahian ekzamenas malsanulinon.*

Estis la 11-a horo nokte, kiam ili atingis la hejmon de Huang Mamian. La infano febris je 41 gradoj C. Ĝiaj vangoj paliĝis kiel plumbo, ĝi malfacile spiris kaj troviĝas en ŝoko toksiĝa. Ekzameno montras, ke la infano suferas de akuta pulmito. Huang Dahian tuj donis urĝajn helpojn kaj moderigis la malsanstaton. Pro hasteco li ne portis sufiĉan sortimenton da medikamentoj, li do iris sur monton kun poŝlampo en pluvego por kolekti kuracherbojn. Post flegado de kelkaj horoj, la infano fine eldanĝeriĝis. Poste Huang Dahian ĉiutage du-tri fojojn iris al la infano por observi ĝian malsanon kaj doni medikamenton ĝis la infano resaniĝis.

Huang Dahian servas al la komunumanoj tute senrezerve. Li ofte diris: "La medikamenta kesto kvankam volumene malgranda havas rolon tre grandan. Mi certe ne vanigos la esperon de la Partio, ĉiam klopodos por preventi kaj kuraci malsanojn por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj." Pro sia fervora servado al la amasoj, li estas multe laŭdata de tieaj ĝuang-aj, hanaj kaj jaŭ-aj komunumanoj.

Fariĝinte "nudpieda" kuracisto, Huang Dahian senlace faras ĉion eblan por kuraci malsanulojn de la taĉmento. Malriĉkamparano Liaŭ Majong suferis ftizon. Por kiel eble plej frue resanigi ŝin, Huang Dahian iris pli ol 50 kilometrojn trans multaj montoj kaj riveroj por kolekti drogherbojn en profunda montaro. Foje li surgrimpis krutaĵon por kolekti drogherbon parazitantan sur arbo. Subite la branĉo rompiĝis kaj li falis de la alteco de pli ol dek metroj. La ulno de lia maldekstra brako estis rompita kaj ankaŭ la brusto vundiĝis. Kvankam la vundoj doloris al li, tamen li ne forgesis kuraci Liaŭ Majong. Post semajno, malgraŭ doloro, li refoje surgrimpis krutaĵojn por kolekti drogherbojn. Post zorga kuracado de tri monatoj, Liaŭ Majong resaniĝis ne elspezinte eĉ unu cendon kaj denove komencis sian laboron de bredistino.

Iufoje, komunumanoj de najbara gubernio portis al Huang Dahian Ĝuang-an komunumaninon Huang Ma-jang, por peti lian helpon. La pacientino suferis hepatiton kaj gastroptozon kaj estis tre malforta. Tiam en la malsanulejo de la produkta brigado ne troviĝis lito por malsanuloj. Kion fari? Huang Dahian loĝigis la malsanulinon en sian hejmon, disponigis al ŝi la plej bone aerumatan ĉambron kaj zorgis ĉiutagan vivon por la malsanulino. Post ok monatoj, al Huang Ma-jang resaniĝis la hepato kaj



*Huang Dahian helpas junan nudpiedan kuracistinon koni kuracherbojn.*

ankaŭ la gastroptozo estas preskaŭ for. En la lastaj jaroj Huang Dahian enloĝigis sume pli ol cent malsanulojn en sian hejmon por kuraci ilin.

Huang Dahian klopodas altigi sian kuracarton kaj senĉese plibonigas sian kapablon por servi al la popolo. Por trovi pli bonan recepton kontraŭ hepatito, li vizitis ĉirkaŭ 50 veteranajn kuracistojn de tradicia medicino, por modeste lerni de ili kaj ripetade pruvadis diversajn receptojn sur la bazo de sia propra sperto kaj fine sukcesis trovi efikan recepton kontraŭ kronika hepatito uzantan lokajn drogherbojn. Sub influo de Huang Dahian, drogherboj okupas 80% de la preskribitaj medikamentoj de la kooperativa kuraca stacio, en kiu li laboras. Tio multe reduktis la elspezojn de la kooperativa kuraco kaj malpezigis la ŝarĝon de la amasoj. En la pasinteco, ĉiu komunumano devis pagi 0.8 juanon ĉiujare kiel kuracan pagon kaj nun nur 0.5 juanon. Post pago de tiu sumo la komunumanoj ne bezonas plu pagi por kuraco kaj medikamento.

Huang Dahian ofte utiligas la okazojn de kuraca rondirado por disvastigi higienajn sciojn inter la amasoj, ĝustatempe fari al ili preventan injekton kaj disdoni preventan medikamenton por garantii la sanon de la komunumanoj kaj akceli la amasan movadon de lerno de Daĝaj en agrikulturo. La komunumanoj laŭdas kontente: "Al nia riĉa rikolto de greno kontribuis ankaŭ nia Dahian!"

**Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino**

| Pekina Tempo | Al Regionoj | Ondoj (m) |
| --- | --- | --- |
| Sabato kaj<br>Dimanĉo<br>4:00 — 4:30<br>G M T<br>Vendredo kaj<br>Sabato<br>20:00 — 20:30 | Eŭropo | 47<br>43<br>33<br>31<br>25 |
| Sabato kaj<br>Dimanĉo<br>19:00 — 19:30 | Japanio, Koreio | 40<br>30 |
| Sabato kaj<br>Dimanĉo<br>20:30 — 21:00 | sudorienta Azio | 30<br>25<br>19 |

## Novaj Esperantaj Eldonaĵoj de Ĉinio

### Granda Historia Venko

54 paĝoj 13 × 18.5 cm.

Prezo: £ 0.07 US$ 0.15 FF 0.90 DM 0.70

### Vizito al Lernejo (rakonto)

64 paĝoj 13 × 18.5 cm.

Prezo: £ 0.14 US$ 0.35 FF 1.80 DM 1.40

### Riverdefenda Skemo (bildrakonto)

84 paĝoj 18.5 × 17.3 cm.

Prezo: £ 0.14 US$ 0.35 FF 1.80 DM 1.40

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio


Ĝenerala Distribuanto: **GUOZI SHUDIAN** (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio

Mendu ĉe peranto vialoka, aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

# Nova fizionomio de Interna Mongolio



Nova fizionomio de Huhehoto




Fera-ŝtala kompanio sur la stepo




Elektronikaj kuracaj aparatoj de Huhehoto




Teksado de tapiŝo




Fruktoj






Brutoj en desinfekta bano







Riĉa paŝtejo



Milicianinoj sur la stepo



Mongola danco

HONG JING:

# La "kvarpersona bando" estas ekstreme dekstra alo

JAM estis frakasita la "kvarpersona bando" de Vang Hongven, Ĝang Ĉunkiaŭ, Giang King kaj Jaŭ Venjuan. Ĉu ili estas "maldekstruloj", "radikaluloj' aŭ dekstruloj, kontraŭrevoluciuloj?

Al tiu demando la ĉina popolo havas nur unu solan respondon. Tio estas, kiel Prezidanto Hua Guofeng montris: "Ili estas ekstremaj dekstruloj, centpocentaj enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj ekstreme ferocaj kontraŭrevoluciuloj! Kiaj maldekstruloj kaj radikaluloj ili estas! Ilia linio estas nesupereble dekstra!"

En politiko ili alprenis strategion "stabiligi Ŝanhajon kaj malordigi la tutan landon" por uzurpi en ĥaoso la plej altan gvidantecon de la Partio kaj de la ŝtato, renversi la diktaturon de la proletaro starigitan de la popolo sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj restaŭri kapitalismon. En organizo ili oponis kontraŭ sinapogo sur la laborista klaso, faris komploton inter si por egoismaj interesoj, kombinis konspirojn kaj praktikis faŝisman diktaturon super la popolamasoj. En ideologio ili kolportis ideismon kaj metafizikon. Ilia linio estas komplete kontraŭrevolucia reviziisma linio.

La "kvarpersona bando" ĉiam klopodis sin ŝminki kiel "maldekstrulojn" kaj "radikalulojn". Ĉar ili devis kovri sian veran kontraŭrevolucian vizaĝon per revoluciaj sloganoj kaj marksisma mantelo. Utiligante la kaptitajn de ili propagandajn maŝinojn, ili energie muldis tiajn falsajn figurojn.

La granda kvanto da faktoj malkovritaj de la tuta popolo en la lastaj monatoj jam senmaskigis iliajn verajn kontraŭsocialismajn vizaĝojn de karieristoj strebantaj al persona potenco. Ili estas nigra bando formita el Kuomintanga spiono, renegato, elemento de malamika klaso kaj nova burĝo. Kriado de revoluciaj sloganoj estis por ili nur kontraŭrevolucia taktiko.

Sub la slogano "batali kontraŭ la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon", la "kvarpersona bando" intrigis faligi grandan nombron da veteranaj revoluciaj kadroj.

Prezidanto Maŭ klare montris, ke la ĉefa enlanda kontraŭdiro en la socialisma periodo estas batalo inter la proletaro kaj la burĝaro, kaj tiu inter la socialisma vojo kaj la kapitalisma; la ĉefa punkto por konduki socialisman revolucion en tiu periodo estas batalo kontraŭ la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Li montris plie, ke la signoj de supre menciitaj potenctenantoj estas praktiko de reviziismo, splitigo kaj konspiroj. Transpreninte revoluciajn sloganojn, la "kvarpersona bando" ŝtele ŝanĝis la kriterion de la enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon por ataki veteranajn revoluciajn kadrojn. Ĝang Ĉunkiaŭ elmetis la t. n. "nepran leĝon", laŭ kiu la veteranaj kadroj partoprenintaj en la demokratia revolucio turniĝos en enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon. Surbaze de tio ili atakis la maljunan generacion de la proletaj revoluciuloj, kiuj sub gvido de Prezidanto Maŭ batalis duonjarcenton por renversi la malnovan reĝimon kaj kons-

trui la novan Ĉinion, kiel neprajn "enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon" en la socialisma periodo. Ĉefministro Ĝoŭ, estimata kaj amata de la tuta popolo, estis la ĉefa objekto de ilia freneza atakado dum la lastaj jaroj. Post la forpaso de Ĉefministro Ĝoŭ ili direktis sian lancpinton al Prezidanto Hua Guofeng, la daŭriganto de Prezidanto Maŭ, kaj aliaj gvidantoj en la centra organo de la Partio. Ili plene reviziis la naturon, taskojn, objekton kaj estontecon de la socialisma revolucio.

Prezidanto Maŭ diris, ke pli ol 90% de la kadroj estas bonaj kaj relative bonaj. Sed Giang King diris, ke "pli ol 75% de la veteranaj kadroj neeviteble turniĝis de demokratoj en enpartiajn potenctenantojn irantajn la kapitalisman vojon". En la naŭa kaj deka kongresoj de la Partio okazigitaj respektive en 1969 kaj 1973, Prezidanto Maŭ klare montris, ke la nuna ĉefa danĝero estas reviziismo. Sed, en la jaroj 1974 kaj 1975, Ĝang Ĉunkiaŭ kaj Jaŭ Venjuan trifoje diris: La nuna ĉefa danĝero estas empiriismo. Per tio ili direktis sian lancpinton kontraŭ veteranaj kadroj kun riĉa revolucia sperto. Prezidanto Maŭ akre kritikis ilin, sed Vang Hongven blokadis tiun instrukcion utiligante la povon en sia mano.

Ili klopodis unuflanke faligi la kernan forton de la Partio kaj aliflanke starigi sektisman sistemon, titolis politikajn oportunistojn, kiuj kuraĝas batali kontraŭ la t. n. "enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon" sub ilia agitado, kanajlojn kaj ŝtelistojn, kiuj okupas sin pri perfortaĵo, detruado kaj prirabado, kiel "ribelulojn", ŝovis ilin en la Partion, postenigis ilin sur gvidaj pozicioj kaj per tio ŝanĝis la naturon de la Partio. Antaŭvespere de la Deka Kongreso de la Partio, Ĝang Ĉunkiaŭ senrajte ŝanĝis la nomliston de reprezentantoj al la kongreso elektitaj de la ŝanhajaj partianoj kaj ŝovis en ĝin tiujn kiuj estis fidelaj al la "kvarpersona bando". Vang Hongven kaj liaj sekvantoj publike elmetis sian kriterion por akcepti partianojn kaj promocii kadrojn en iu kunveno, kiun ili regis: "Ĉio dependas de bezonoj", "ĉio estas bona, kondiĉe ke tion konfidas Giang King". Ili uzis kaj protektis eĉ bienulojn, kulakojn, kontraŭrevoluciulojn kaj fiulojn.

Kiaj "maldekstruloj" kiuj batis la revoluciajn fortojn kaj subtenis la kontraŭrevoluciajn?!

Sub la slogano "teni la revolucion" la "kvarpersona bando" subfosis la socialisman ekonomion.

Unu el la fundamentaj taskoj de la diktaturo de la proletaro estas disvolvi la socialisman ekonomion, kaj la disvolvo de la produktaj fortoj estas materia bazo por firmigi kaj fortigi tiun diktaturon. Prezidanto Maŭ alvokis en 1974: rapide disvolvu la nacian ekonomion. En la Raporto pri la Laboro de la Registaro al la Kvara Tutlanda Popola Kongreso en januaro de 1975 Ĉefministro Ĝoŭ proklamis laŭ instrukcio de Prezidanto Maŭ la grandiozan celon efektivigi modernigon de industrio, de agrikulturo, de sciencoj kaj teknikoj kaj de nacidefendo en la kuranta jarcento por konstrui Ĉinion en potencan socialisman landon. Sed, en iu kunveno Ĝang Ĉunkiaŭ kritikis la "teorion de produktaj fortoj", kalumniante, ke efektivigi la kvar modernigojn signifas "leviĝon de artsatelitoj al la ĉielo kaj falon de la ruĝa flago al la tero" kaj "restaŭron de kapitalismo".

Teni la revolucion kaj stimuli la produkton estas sensanĝa instruo de Prezidanto Maŭ. Politiko devas komandi ekonomion, tamen servi al la ekonomia bazo. La "kvarpersona bando" elmetis la absurdaĵon: "Se nur la revolucio estas bone kondukata, ne gravas eĉ la fakto ke reduktiĝas la produktoj." Ili ordonis, ke la radiostacioj kaj ĵurnaloj malmulte propagandu spertojn de la socialismaj industria kaj agrikultura modeloj Daking-olekampo kaj Daĝaj-brigado starigitaj de Prezidanto Maŭ en tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto, kalumniante ke ili estas "tipoj de la teorio de produktaj fortoj". Kriante: "prefere kreskigi socialismajn herbojn ol kapitalismajn plantidojn", ili malhelpis la agrikulturan disvolviĝon; kriante: "prefere malalta rapideco de socialismo ol alta rapideco de kapitalismo", ili bremsis progresadon de la industrio; kriante: "prefere malfruiĝo de socialisma trajno ol la ĝustatempeco de la kapitalisma", ili subfosis la fervojan trafikon; kriante: "ne produktu por reviziismo", ili agitis por

ĉesigi produktadon; kaj kriante: "kritiku la teorion ĉio decidita de armilo", ili malhelpis modernigon de la armeo. En Venĝoŭ kaj aliaj lokoj, kie ili transprenis la potencon, la ŝtataj fabrikoj, komercaj kaj policaj instancoj estis paralizitaj kaj ĉien inundis kapitalismaj entreprenoj, privata komercado, nigraj merkatoj, akaparo, spekulado kaj altpreza ekspluatado en grena negoco.

Kiaj "maldekstruloj" kiuj subfosis la socialisman ekonomion kaj restaŭris la kapitalisman!?

Sub la slogano de kondukado de revolucio en la superstrukturo, ili detruis la socialisman superstrukturon.

La literatura kaj arta revolucio devas sekvi la direkton de servo al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Sed, la "kvarpersona bando" turnis la literaturon kaj arton en la organon de sia bando por kapti al si la gvidantecon de la Partio kaj la ŝtato. Ili komplete ignoris la atingojn de la proletaj literaturo kaj arto de Ĉinio kaj aliaj landoj dum la pasintaj cent jaroj kaj tute neis ĉiujn bonajn verkojn kaj spertojn depost publikigo de la "Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an" de Prezidanto Maŭ en la jaro 1942, precipe en la periodo de la fondiĝo de la nova Ĉinio ĝis la kultura revolucio, kaj nuligis la politikon de Prezidanto Maŭ por disvolvi la socialismajn literaturon kaj arton **"kune floru cent floroj kaj voĉojn aŭdigu cent skoloj"**.

La eduka revolucio devas efektivigi la principon servigi la edukon al la proleta politiko kaj kombini la edukon kun produktado kaj korplaboro por elkulturi laborulojn kun klereco kaj socialisma konscio. Sed, sub la slogano de kritiko al "klerigo en la unuan lokon", la "kvarpersona bando" neis lernadon de kulturaj scioj kaj fundamentaj teorioj. Kriante: "prefere laboruloj sen klereco", ili intencis teni la vastan laborantan popolon en stato de senklereco.

La socialisma reformo sur la scienca kaj teknika fronto devas efektivigi la principon servigi la sciencesploran laboron al la proleta politiko, la produktado kaj la popolamasoj. Sub la preteksto de kritiko al la "tri apartiĝoj", ili metis aplikan sciencon kontraŭ teorio, produktan praktikon kontraŭ la scienca, la rolon de specialistoj kontraŭ sciencaj aktivadoj de la amasoj por oponi kontraŭ teoria esplorado, nuligi sciencan eksperimentadon, nei la rolon de specialistoj, malhelpi la planadon de sciencaj laboroj por la ŝtato kaj subfosi la edukadon de laborantaro de scienco kaj tekniko.

Kiaj "maldekstruloj" kiuj subfosis la disvolvadon de la socialismaj kulturo, eduko kaj sciencoj!?

Deŝirinte la maskon de la "kvarpersona bando" oni povas vidi kaj juĝi, kiaj uloj ili estas. Iliaj agadoj tute kontraŭas la esperon kaj interesojn de la okcentmiliona ĉina popolo, kiu okupas sin pri socialismaj revolucio kaj konstruado. Tio estas tute klara.

Ne estas strange, ke interne de la komunista partio aperis en la nuna ĉina revolucio tiaj kontraŭrevoluciuloj kia estas la "kvarpersona bando" sin titolinta per "maldekstruloj". Tio spegulas nur la komplikecon de klasbatalo en la socialisma periodo. Pro la venko kaj profundiĝo de la socialisma revolucio, tio fariĝas la leĝo de ilia aktivado, ke ili subfosas la revolucion, nur per sekretaj intrigoj, praktikante artifikojn de duvizaĝuloj, "tenante ruĝan flagon por oponi kontraŭ la ruĝa flago." Kompreneble, estas pli malfacile travidi tiajn duvizaĝulojn ol la publikajn kontraŭrevoluciulojn, tamen, ili estas finfine malkaŝeblaj por la ĉina popolo, kiu estas kulturita per Maŭzedongpenso.

Tia estis la "kvarpersona bando "same kiel la kontraŭrevolucia kliko de Lin Biaŭ.

# En la sama lekciejo

Por amikeco

de ZENG MING


EN vasta kaj hela kabineto de hospitalo, kelkaj ĉinaj kaj alilandaj kuracistoj estis absorbitaj en ekzamenado de pacientoj. Envenis subite mezaĝulo kun dolora mieno. Li malfacile lamis apogante sin al juna akompananto. Siria kuracisto M. G. Mousli rapide iris renkonte al li kaj atenteme helpis lin sidiĝi. Poste Mousli afable pridemandis kaj ekzamenis lin kaj ripetade palpis lian vertebraron ambaŭflanke kaj absorbite perceptadis la mansenton. Nelonge poste li diris al apuda ĉina kuracisto, ke la paciento suferas de malordo de apofizaj artikoj de lumbaj vertebroj kaj lezo de pirforma muskolo. Ĉina kuracisto faris refojan ekzamenon kaj venis al la sama konkludo. Tiam Mousli lerte faris por la paciento rotacian reduktadon. Kun sono de "krak" la luksaciita spina proceso estis relokita. La malsanulo stariĝis kaj iradis malrapide en la ĉambro. Li diris, ke lia sufero evidente moderiĝis. Malaperis lia antaŭa suferplena mieno. Kun ĝojo li prenis al Mousli la manon kaj ripetade diris al li "dankon". Ĉiuj ĉeestantoj varme aplaŭdis por gratuli la kuraciston.

Jen kion vidis la subskribinto en la kliniko dum la praktikado de fremdlandaj kuracistoj de Studrondo pri Kombina Kuraco de Artikaj Lezoj per Ĉina kaj Okcidenta Medicinoj.

Kuraci lezojn de osta artiko per kombino de ĉina kaj okcidenta medicinoj, tio estas nova frukto de ĉinaj medicinistoj, kiuj studas la medicinan heredaĵon de la patrolando aplikante la teknikon de la moderna medicino. Tiu klopodo estas nun bone taksata kaj akceptata de medicinaj rondoj en kaj ekster la lando. De aprilo ĝis julio de la kuranta jaro la Higiena Ministerio de Ĉinio fondis studrondon pri tiu terapio. 18 kuracistoj el Afganio, Birmo, la Jemena Demokratia Popola Respubliko, Irano, Laoso, la Filipinoj, Srilanko, Sirio, Vjetnamio, la Araba Jemena Respubliko kaj Jugoslavio estas invititaj al Pekino por studi tiun novan terapion kune kun ĉinaj medicinistoj.

Lezo de osta artiko, precipe doloro je la kolo, ŝultro, lumbo kaj gambo estas tre oftaj malsanoj por laboruloj. Kontraŭ tiaj malsanoj oni kutime aplikas medikamenton, trenadon, blokadon, ĥirurgian operacion k.a. Sed tiuj metodoj ne estas tre efikaj al iuj kazoj de tiaj mal-

*Ĉinaj kaj fremdlandaj kuracistoj kune faras kuracadon.*





*Laosa kuracistino (la dekstra) kuracas pacientinon.*



*Jugoslava kuracisto ekzamenas pacienton.*


sanoj. La nova kuracmetodo kontraŭ lezo de mola histo kun mana manovrado kiel la ĉefa rimedo malfermis novan vojon por rapida kuraco de doloro ĉe kolo, ŝultro, lumbo kaj gambo. La nova metodo kontraŭ frakturo per parta latbandaĝo ebliganta moviĝon kun funkcia ekzercado kiel la ĉefa karakterizo estas evidente supera al la rutina metodo de grandarea gipsobandaĝo.

En tiu ĉi studrondo lekciis ĉefe Feng Tianjoŭ, juna ĥirurgo studanta kombinan kuracon de lezo de mola histo per ĉina kaj okcidenta medicinoj, kaj Ŝang Tianju, specialisto sin okupinta multjare pri kuraco de frakturo ankaŭ per kombino de ĉina kaj okcidenta medicinoj.

En iu aprila tago Feng Tianjoŭ komencis prezenti sian sperton en kuraco de lezo de mola histo. Li kondukis malsanulon en la lekciejon. Pro traŭmato la kolo de la malsanulo rigidiĝis, kun kapdoloro, orelzumado kaj malfacileco en glutado. Multaj kuracmetodoj laŭ okcidenta medicino montriĝis senefikaj. Feng Tiajoŭ petis fremdlandajn kuracistojn fari ekzamenon al la malsanulo. Plejparto de la kuracistoj diagnozis, ke la kaŭzo de la malsano troviĝas en kolaj vertebroj. Tiam Feng Tianjoŭ komencis delikate fari al lia kolo lertan manovradon per siaj manoj. Kaj baldaŭ ĉiuj ĉeestantoj mire konstatis, ke la paciento jam povas libere turni sian kapon. Ankaŭ lia orelzumado kaj kapdoloro multe moderiĝis. X-radiaj fotoj faritaj antaŭ kaj post la kuraco montris, ke jam estas relokita la luksaciita vertebro. La fremdlandaj kuracistoj nedetenebie aplaŭdis kaj konkure manpremis al Feng Tianjoŭ.

Birmaj kuracistoj Than Tun Aung kaj Sam Pah Kay diris: "Multaj kuracistoj aspiris solvi la problemon de doloro ĉe la kolo, ŝultro, lumbo kaj gambo, kaj vi solvis la malfacilaĵon dank' al kombino de ĉina kaj okcidenta medicinoj, tio estas nova atingo en ortopedio." Kuracisto Mohamed Abdul Wadood de la Araba Jemeno diris: "Nia lando estas lando evoluanta kaj la ekonomio estas ankoraŭ postiĝinta kaj plejparto de la loĝantoj laboras per manoj, precipe virinoj kutimas uzi la kapon por porti objekton kaj ofte malsaniĝas al ili la kolaj kaj lumbaj vertebroj. La nuna metodo simpla sed efika povas liberigi multajn homojn de turmentado de tiuj malsanoj."

Por studi la novan terapion, la fremdaj amikoj pagis grandan energion. Dum lekcioj ili atente faris notojn, en diskutado ili aktive eldiris siajn opiniojn kaj al malsanuloj ili faris detalan ekzamenadon. Laosa kuracistino Nang Kaysone Keole lernis tre diligente. Ŝi persiste ekzercis siajn fingrojn kaj brakojn por adapti sin al kuraca manovrado. Irana kuracisto Daryouch Nasseri estas spertriĉa pri ostaj malsanoj. Li estas aktiva en pripensado kaj kolokvo. Multaj amikoj verkis artikolojn pri sia sperto en kombina kuracado de artikaj lezoj



*Feng Tianjoŭ (la dekstra en la posta vico) direktas fremdajn kuracistojn.*

per ĉina kaj okcidenta medicinoj. Dum tri monatoj tiuj fremdlandaj kuracistoj traktis 765 pacientojn de tiaj malsanoj kun bonaj rezultoj plejparte. Cetere ili faris frakturan redukton al 21 pacientoj laŭ la nova kuracarto per manoj kaj akiris kontentigan rezulton.

Ĉiuj pacientoj, kiuj venis al la studrondo por ricevi kuracadon, estis tre dankaj al tiuj fremdlandaj kuracistoj, kiuj faris longan vojaĝon por interŝanĝi kun ĉinaj kolegoj sperton kaj varmkore kuracis ilin. En junio, venis de tre malproksima Nordoriento de nia lando malsanulo kiu suferis doloron en lumbo kaj gambo jam 6 jarojn. Kun kora simpatio al la paciento afgana kuracisto faris al li trifoje kuracadon kaj resanigis lin. Reveninte al sia laborloko, la paciento skribis al la fremdlanda kuracisto varman leteron por lin danki. Li skribis: "En la kuracado al mia malsano kristaliĝis profunda amikeco inter la ĉinoj kaj fremdlandaj amikoj." Foje, sub la helpo de Ŝang Tianju, srilanka kuracisto Karunadasa faris permanan frakturan redukton por malsanulo. Forlasante operacian tablon, la paciento emocie diris al la kuracisto: "Mi neniam forgesos, ke miaj rompitaj ostoj estas rekunigitaj de fremdlanda kuracisto." Kvankam post la penado Karunadasa ŝvitegis, tamen li sentis grandan ĝojon pro la sukceso. Li dankis la pacienton kaj invitis Ŝang Tianju gasti ĉe li. Alia paciento, kiun resanigis filipina kuracisto, donacis al lasta bukedon da silkaj floroj speciale faritan por esprimi la deziron ke ĉiam floru la frateco inter la ĉina popolo kaj la popoloj de la tria mondo, kiel tiuj nevelkaj floroj.

Dum ĉifoja neforgesebla kunestado la ĉinaj kuracistoj lernis ankaŭ multon utilan de fremdlandaj kuracistoj. Jugoslava kuracisto konigis al ĉinaj kuracistoj siajn studfruktojn pri degeneraj malsanoj ĉe kolo kaj ŝultro. Srilanka kuracisto konigis al la aliaj sian tradician metodon en kuraco de malsanoj kaŭzitaj de kontuzo kaj vundo. Birmaj kuracistoj konigis al aliaj siajn studfruktojn pri interna fikso de rompita osto per metalo. La spertoj de la fremdlandaj amikoj estas tre bonvenaj al la ĉinaj kuracistoj.




## NAVIGA SIGNALLAMPO DE NOVA TIPO

La novtipa naviga signallampo ekipita per siliciaj piloj sunenergiaj estas jam sukcese farita de koncernaj fakoj de nia lando. Ĝi estas grava frukto de nia scienca esplorado por uzi naturan energion anstataŭ kemian energion en signaliloj por ŝipgvidado.

La praktika uzado pruvis, ke tiu signallampo havas avantaĝojn de longa uzado, stabila brileco kaj facileco en protektado kaj manipulado. Ĝi multe malpezigis la laboron de navigaj laboristoj kaj montris sian apartan superecon en uzado sur izolaj insuloj kaj malfacilaj navigaj vojoj.

Nun la havenoj kaj navigaj vojoj de Tiangin, Ŝanhajo, Guangdong kaj tiuj sur Jangzi-rivero kaj la Suda Ĉina Maro jam prove ekuzis tiun novtipan signallampon.

## NOVA KOAKSOFORNEGO KOMENCIS PRODUKTADON

Nova moderna koaksofornego lastatempe estas konstruita en la Ĉefurba Fera kaj Ŝtala Kompanio en Pekino kaj oficiale ekfunkciis, produktante bonkvalitan koakson por uzo en metalurgio. La funkciado de tiu koaksoforno plialtigis kapablon de la nomita kompanio en koaksoproduktado per pli ol 60%

kaj efike solvis la problemon de malsufiĉo de koakso. Samtempe ĝi liveras pli multe da krudmaterialo al la kemisterka fabriko de la kompanio.

### HIDROELEKTREJO EN DEZERTO

La diversnaciecaj popolanoj de Uŝen-hoŝoo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio de nia lando konstruis Batuvan-hidroelektrejon kun kapacito de 2,800 kilovatoj en Muus-dezerto ĉe la supra baseno de Vuding-rivero. Nun la kapacito de la instalitaj generatoroj estas 1,800 kilovatoj, sufiĉa por kontentigi la bezonojn en produktado kaj lumigado de la hoŝoa urbo kaj ĝiaj ok komunumoj kaj unu paŝtejo.

### ALIA NOMBRO DA NACIMALPLIMULTAJ PILOTOJ IRIS SUR LABORPOSTENOJN


Lastatempe alia nombro da posteuloj de la liberigitaj sklavoj de ĉinaj nacimalplimultoj finis kun sukceso sian studon en la aviada lernejo kaj iris sur laborpostenojn.

Tiuj novaj aviadistoj estis speciale elektitaj kaj kulturitaj laŭ instrukcio de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj antaŭ lia forpaso. Ili venis el aŭtonomaj regionoj de Hingiang, Tibeto kaj Ninghia kaj provincoj Siĉuan kaj Kinghaj, kaj inter ili troviĝas ujguroj, kazaĥoj, mongoloj, tibetanoj, huj-oj, tuĝja-oj, ĉjang-oj, ĥalĥazoj, sibooj kaj menba-oj. Estas la unua fojo por la nova Ĉinio en kulturado de tiel multaj nacimalplimultaj pilotoj.

### BOTANIKA ĜARDENO EN SABLA DEZERTO

En sabla Badangilin-dezerto de Gansu-provinco nove konstruiĝis botanika ĝardeno, kies teritorio superas 66 hektarojn. Ĝi estas la unua botanika ĝardeno de sablejaj plantoj en nia lando, fondita post dujara malfacila laborado de agronomoj kaj laboristoj. Nun en ĝin oni sukcesis enkonduki pli ol 70 diversajn specojn de arboj, arbustoj kaj herboj.

La botanika ĝardeno estas bazo por esplori fundamentan teorion de sablejaj plantoj kaj ankaŭ bazo por liveri semojn de bonspecaj sablejaj plantoj. Ĝi provizas ankaŭ favorajn kondiĉojn por esplorado, instruado, disvastigado de scioj pri sablejaj plantoj kaj disvolvado de amasa scienca eksperimentado.



*Sciencaj laborantoj de la Ŝanhaja Observatorio de la Ĉina Akademio de Sciencoj diskonigadas norman tempon al la fakoj de mezurado, navigado ktp. Dank' al sia klopodado ili jam ĝustigis la eraron de 0.002 milisekundo en 1963 ĝis la nuna 0.0013 milisekundo. La foto montras sciencajn esplorantojn en laboro.*

### KOMPLETA FOSILIO DE VIANDVORA DINOSAŬRO

La relative kompleta fosilio estis trovita lastatempe en Jongĉuan-gubernio de Siĉuan-provinco, kie oni konstruas akvokonservejon.

Laŭ ekspertizo tiu dinosaŭro vivis en posta ĵuraso antaŭ 150,000, 000 jaroj. La fosilioj de la kranio, spino, talia zono kaj postaj membroj estis bone konservataj kaj la simetriaj pozicioj de ostoj restas en relative normala ordo. Estas unuafoje por nia lando trovi tian kompletan fosilion de viandvora dinosaŭro. Ĝi havas gravan sciencan valoron por esplori dinosaŭrojn de mezozoiko kaj ruĝan tavolon de ĵuraso en Siĉuan kaj liveris bonan materialon por koni tiaman naturan medion, ekzemple pratempajn geologion, klimaton k.a.


### GRANDA ANTIKVA TOMBO

Antaŭ nelonge oni trovis grandan antikvan tombon kun ligna

eksterĉerko el la komenca periodo de Okcidenta Han-dinastio (206 a. k. — 25 p. k.) en Luobovan de Gujhian-gubernio de la Guanghi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono. La granda kvanto da eltombigitaj kulturaj objektoj liveris gravajn materialojn por esplori antikvajn historion kaj kulturon de la suda parto de nia lando.

La tombo estis plifrue priŝtelita, tamen el ĝi oni ankoraŭ eltombigis pli ol mil objektojn inkluzive de bronzaĵoj, feraĵoj, lakaĵoj, lignaĵoj, fajencaĵoj, jadaĵoj, teksaĵoj kaj semoj de plantoj. En la tombo troviĝis ligna tabulo kun pli ol 300 ĉinaj ideografiaĵoj, en kiu estas registritaj la entombigitaj objektoj. La formoj de plejparto de la objektoj similas al tiuj elfositaj en basenoj de la Flava Rivero kaj Jangzi-rivero. Iuj el ili estas transportitaj de norda Ĉinio kaj aliaj havas klaran lokan koloron.

Iuj el la elterigitaj bronzaĵoj portas belan lokan pentraĵon sur la surfaco kaj aliaj havas videblajn radiojn sur la fundo interne, kio montris progresintan teknikon en polurado. Iuj jadaj tasoj atingis sufiĉe altan nivelon en gravura arto. Tiuj objektoj havas gravan valoron por studi teknologian historion de nia lando.



*Laborantoj de la Agronomia Instituto de Ninghia sukcesis apliki elektrostatikan fotografadon per portebla X-radia aparato en diagnozo de astma malsano de porkoj.*


## ANTIKVA KULTURA LOKO KAJ PUBLIKA TOMBEJO DE KLANO

Lastatempe oni eltrovis lokon de antikva kulturo kaj publikan tombejon de klano antaŭ 3,000-5,000 jaroj en Ŝihia proksime de la kaverno de Maba-homo de Kjugiang-gubernio de Guangdong-provinco. En la tombejo estas malkovritaj ĉ. 3,000 diversformaj objektoj lerte faritaj. Dank' al tiu malkovro, oni ne nur akiris atestojn por difini la neolitikan kulturan periodon de Guangdong kaj studi pri la disfalo de la primitiva socio en nia lando sed ankaŭ ricevis gravan materialon por studi pri la interligo kaj reciproka influo de la norda kaj suda kulturoj en la neolitiko en nia lando.

*Argilaj objektoj*




*Ŝtonaj objektoj*



# Kuraĝigaj paroladoj

Lastatempe en Pekino iuj sciencistoj kaj labormodeloj de nia lando faris paroladojn al pli ol 7,000 geknabaj sciencaj amatoroj, varme kuraĝigante la lastajn bone lerni fundamentajn sciojn de matematiko, fiziko, kemio k.a. por konstrui nian landon en modernan socialisman potencon kaj surgrimpi monton de sciencoj kaj teknikoj.



La kunvenejo



Fang Ji (dekstre en la fronto), membro de la politika Buroo de CK de KPĈ kaj vicestro de la Ĉina Akademio de Sciencoj ĝoje intervidiĝas kun junaj sciencaj amatoroj.

Knabinoj petas aŭtografon de fizikistino Lin Lanjing.



Juna matematikisto Jang Le (meze en la





Vicprezidanto de la Tutlanda Scienca kaj Teknika Asocio, fama fizikisto Goŭ Pejjuan (maldekstre en la fronto) kuraĝigas geknabojn bone lerni.


Vicprezidanto de la Tutlanda Scienca kaj Teknika Asocio Maŭ Jiŝeng (maldekstre) kaj juna matematikisto Ĉen Gingĵun, kiu akiris rezultojn de avangarda monda nivelo en studo pri la teorio de nombroj, inkluzive de progreso super Goldbach-konjekto.

fronto) interparolas kun geknaboj.






# Diligentaj sciencistoj kaj teknikistoj




Hu Han (maldekstre) de la Genetika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj lia esplora grupo sukcesis elkulturi novan specion de tritiko per metodo kulturi plantojn el poleno.

Profesoro de la Matematika Fakultato de la Ŝanhaja Fudan-universitato Su Bu-king (meze en la fronto) kaj laboristoj de ŝipkonstruejo sukcesis en esplorado de linioglatigo de pruo.











La ĉina fama biologo Tong Diĝoŭ senĉese progresis en studo pri fundamentaj teorioj de rilato inter nukleo, citoplasmo kaj genetiko.

Matematikistoj de la Matematika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj Jang Le (dekstre) kaj Ĝang Guanghoŭ akiris gravan sukceson en studo pri teorio de funkcioj.

Laboristodevena help-esploranto Ĉen Ĵenfu de la Ŝanhaja Huadong-a Kalkulteknika Instituto esploras kune kun siaj kolegoj altarapidecan elektronikan komputeron.







La sciencaj laborantoj en la dezerto

# Reformo de dezerto

Ĉinaj sciencaj laborantoj faris esploradon pri akvofonto, grundo, flaŭro, klimato, vento kaj movado de dunoj en Gurbantunggut-dezerto de Ĝungar-baseno kaj Ŝihezi-oazo de Hingiang kaj per tio liveris grandan kvanton da sciencaj materialoj por reformi la dezerton kaj konstrui novan oazon.


Helpate de la sciencaj laborantoj la lokaj popolanoj iras al reformado de la dezerto.




Esplorado pri bona specio de plantoj en la randa areo de la dezerto




Preno de specimeno de grundo en la oazo








Elektronika esplora mikroskopo de tipo DX-3

# Nombro da elektronikaj esploraj mikroskopoj estis elfarita



La Pekina Fabriko de Sciencaj Aparatoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj sukcesis fabriki nombron da elektronikaj esploraj mikroskopoj de tipo DX-3, kiuj estas jam uzitaj en branĉoj de metalo, geologio, medicino kaj biologio. Per ĝi oni povas observi rekte surfacon de granda specimeno kaj ĝi havas superecon de alta distinga povo, forta stereeco k. a.



Supre: Formiko pligrandigita je 40-oblo

Malsupre: Formika okulo pligrandigita je 400-oblo

# CELEBRADO









6611



BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

世界语《中国报道》一九七七年第十一期（本刊代号：二——九一五